Mia plej granda „hobio” estas renovigo de malnovaj (tiel nomataj „old timer”) aŭtomobiloj. Mi tre ŝatas plezuri la belegan rezulton de mia laboro. Mi havas tri malnovajn aŭtojn, kaj ofte mi uzas ilin. Mi partoprenas konkurojn, kaj mi havas jam du orajn medalojn.

Debrecen, la 1-an de februaro 2016

Skribu al mi, pri kio vi interesiĝas!

Kun amikaj salutoj

Lacika

****

Levél (6.)

Barátja vendégségbe hívja meg új lakásába. Írjon erről a látogatásról moszkvai ismerősének.

- Írja meg, hogy régi gyermekkori barátja meghívta önt otthonába!
- Írja le a lakását!
- Emelje ki, hogy barátjának hatalmas könyvtára van!
- Hasonlítsa össze az ön szerényebb, de igényesebben összeállított könyvtárával!
- Ön szerint milyennek kell lennie egy ideális házi könyvtárnak?

Kara Nataŝa!

Mi esperas, ke vi fartas bone en Moskvo fore de via patrujo. Imagu, ankaŭ mi vizitis eksterlandon. Mia malnova amiko, kun kiu mi konatiĝis dum miaj infanaj jaroj, invitis min al la itala urbo Rimini. Mi pasigis ĉe li sep tagojn.

Dume li prezentis al mi sian familian domon kun florĝardeno. Lia domo apartenis al sia praavino, kiu estis itala grafino en la dekoka jarcento. Tiu domo estas ne simpla domo, sed grandioza kastelo. Ĝi konsistas el dudek ejoj; en la konstruaĵo troviĝas eĉ balejo, galerio, kie oni povas rigardi belegajn pejzaĝojn, grandvalorajn portretojn de famaj italaj pentristoj. Li havas bibliotekon kun dumil libroj. Lia libraro troviĝas en la norda parto de la kastelo. Ĝia tereno estas proksimume 70 kvadratmetra. Ĝi estas elegante ornamita kun pompaj lustroj, impozaj kurtenoj kaj ronda tablo farita el vitro kaj marmoro.

Sur la muroj pendas grandegaj bretoj, plenaj de famaj, raraj, malnovaj libroj. Ili estas kaj latinlingvaj, kaj itallingvaj. Ili estas valoraj, sed ne legeblaj. Kiu komprenas la latinan lingvon? Laŭ mia vidpunkto mia hejma biblioteko estas utiligebla. Ĝi enhavas nur famajn romanojn, enciklopediojn, manlibrojn, leksikonojn. Ofte mi uzas ilin dum mia hejma la- boro, ekzemple, kiam mi pretigas min al miaj studhoroj, aŭ mi skribas mian hejman tas- kon.

Debrecen, la 2-an de decembro 2016

Kun amikaj salutoj

Petro

Levél (7.)

Családja külföldi vendégeket vár vacsorára. Az ön feladata a vacsora elkészítése. Ezt és az alábbiakat írja meg ismerősének.

1. Mutassa be a meghívottakat. (Kik jönnek, honnan, hányan stb.) 2. Igazi magyaros ételekkel szeretné megvendégelni őket. 3. Állítsa össze a menüt. 4. Az egyik családtagjának eszébe jut, hogy a vendégek vegetáriánusok. 5. Az utolsó pillanatban a menüt teljesen meg kell változtatni.

Kara Ana!

Mi dankas vin por via longa letero, kiun mi ricevis pasintsemajne. Mi petas vian pardonon pro mia longa silento, sed mi ne povis respondi, ĉar mi estis treege okupita.

Je mia granda surprizo kaj ĝojo miaj geonkloj vizitos nin sekvontsemajne. Ili venos el la Usono, el Novjorko por sep tagoj. Mi dezirus kuiri al ili hungarecajn manĝaĵojn. Ili estas bonhumoraj, modernaj kaj karaj geedzoj, tial mi tre amas ilin. Mi esperas, ke kun ili alvenos Helena, kun kiu mi renkontiĝis antaŭlonge. Ilia filino estas je du jaroj pli aĝa ol mi. Ŝi laboras kiel reĝisorino en granda usona filmfirmao „Universal”. Ekzemple ŝi reĝisoris la filmon, en kiu rolis Julia Roberts kaj Richard Gere. Ĝia titolo estas „Altara virino”. Ege mi atendas ilin. Imagu! Mi aĉetis en la magazeno Plaza bovoviandon, muelitan porkviadon, diversajn legomojn, spicojn kaj fruktojn. Mi estus dezirinta kuiri bovoviandan supon kaj farĉitajn brasikojn. Mi antaŭmendis ruskreman torton. Mia patrino diris nur hieraŭ, ke la tuta familio estas vegetarana! Pro tio mi devis ŝanĝi la tutan manĝaĵaron. Mi kuiros fruktosupon el piroj, prunoj, fragoj, framboj, ĉerizoj, griotoj. Anstataŭ farĉitaj brasikoj mi gratenos fungojn. Ili povos manĝi ilin kun salato el diversaj legomoj.

Mi esperas, ke miaj manĝaĵoj ekplaĉos al ili. En mia sekvonta letero post du semajnoj mi skribos al vi pri tio.

Miskolc, la 2an de majo 2016

Kun esperantistaj salutoj: Enikő

Levél (8.)

Győzze meg barátját (testvérét) arról, hogy ő is vegyen részt a házimunkában!

1. Sorolja fel, milyen házimunkák fordulnak elő általában otthon.
2. Van-e női és férfi munka, vagy ez téves megítélés?
3. Bíztassa barátját (testvérét)! Javasolja, hogy mit és hogyan segítsen feleségének.
4. Érveljen a munkamegosztás fontossága mellett. Hogyan valósul meg ez az ön családi életében?

Kara Teodoro!

Lastfoje en via letero vi plendis pri via edzino, ĉar ŝi postulis vian helpon en la hejma laboro. Mi devas aserti senindulge, ke via ĉarma edzino pravas.

Preskaŭ ĉiuj viroj pensas, ke virinoj devas purigi loĝejon, ŝuojn, polvosuĉi tapiŝojn, lavi vestaĵojn, telerojn, kuiri, friti, baki rosti, varti gefilojn, kudri, stebi. Viraj „taskoj" estas legado de gazetoj, ĵurnaloj, libroj, televidrigardado, trinkado de biero kaj hejma ripozado. Tio estas granda miskompreno!

Ne forgesu, ke via edzino ne estas servistino, kelnerino, hejma ĉambristino, ĝardenistino! Mi supozas, ke ankaŭ vi povas (scipovas, kapablas!) polvosuĉi, lavi telerojn, labori en via ĝardeno (akvumi kreskaĵojn, fosi, rasti, sarki ktp.)

En nia familio ekzistas labordivido ekde multe da jaroj. Mia edzo veturigas niajn gefilojn al la infanĝardeno (kaj matene kaj posttagmeze fine de sia laboro), li havas tempon por aĉetadi, laboreti en nia ĝardeno. Ofte li helpas al mi lavi telerojn, kaj ĉiam li estas kara, tolerema. Niaj gefiloj lavas siajn vestaĵojn memstare, purigas siajn ĉambrojn, du-trifoje semajne ili preparas al ni matenmanĝon.

Tiu labordivido helpas al ni havi pli multe da libera tempo, kiun ni povas pasigi kune. Ni vizitas kinejon, teatron, ekspoziciojn, ofte ni ekskursas. Tiu vorto „labordivido" povas helpi en la solvo de diversaj problemoj, faciligi, dolĉigi nian geedzan vivon.

Mi proponas al vi, ke ankaŭ vi helpu hejme. Tiel via vivo iĝos pli sentoriĉa, agrabla kaj tolerebla. Tion skribas al vi via fratino. Ne forgesu tion!

Transdonu miajn salutojn al viaj familianoj!

Debrecen, la 12-an de novembro 2016

Mi kisetas vin.

Kun koraj salutoj

Krisztina

****

Levélírási témák

1. Ön magyar turista, aki a berlini rendőrségen írásban feljelentést tesz. Írja le, hogy
   - most érkezett Berlinbe, és a vonaton ellopták a bőröndjét;
   - éppen akkor aludt;
   - egy gyanús fiatalember vihette el a bőröndjét, aki ugyanabban a fülkében utazott;
   - adjon róla személyleírást;
   - milyen holmik voltak a bőröndben?
   - kérjen gyors intézkedést;
   - adja meg a szálloda nevét, szobaszámát és az ön mobilszámát.

2. Ausztriában beiratkozott egy német nyelvtanfolyamra. Az első két nap után nincs megelégedve az oktatással. Írásban reklamáljon, és udvariasan kifogásolja a következőket:

- a tanárok halkan és gyorsan beszélnek;
- nem veszik tekintetbe, hogy középhaladó csoportról van szó;
- a teremben csak 18 fok a hőmérséklet, nincs normális fűtés;
- olyan sok házi feladatot adnak, hogy a napi nyolcórás tanulás mellett másnapra
- lehetetlenség mindet megcsinálni;
- a kollégiumi szobában tízen vannak, nem tud rendesen pihenni és tanulni;
- kérje, hogy orvosolják panaszait.

3. Írjon német barátjának levelet.

- Hívja meg szülővárosába két hétre.
- Javasoljon több közös programot (városnézés, orgonahangverseny, séta, kirándulás a környékre stb.)
- Érveljen a hangverseny mellett: óriási az érdeklődés, híres énekesek lépnek fel, ismerősei is ott lesznek.
- Kérjen tőle egy szívességet (ajándékot).
- Írja meg, hogy kellemes meglepetésben lesz része.

4. Önnek már öt éve van jogosítványa. Angol barátja csak most szerezte meg.

- Barátja hosszabb külföldi útra akar indulni.
- Írja meg neki, hogy tapasztalt autóssá csak akkor válik, ha vezet, de nem hegyi szerpentin erre a legjobb lehetőség. Először a városban gyakoroljon.
- Mindig ügyeljen a forgalomra, vigyázzon mások testi épségére, ne lépje át a megengedett sebességhatárt.
- Kérje, hogy fogadja meg tanácsait.

5. Írja meg német barátjának, hogy kéthónapos német ösztöndíjat kapott.

- Hamarosan indul Berlinbe.
- Ismertesse a részleteket (mivel és mikor érkezik, hol fog lakni, mit fog tanulni stb.).
- Sajnos nem lakhat a barátjánál, mert a cége fizeti a szállást egy kollégiumban.
- Javasolja, hogy találkozzanak. Kérje meg, hogy várja önt a pályaudvaron.
- Kérdezze meg, milyen ajándékot szeretne kapni.

6. Hosszú külföldi tartózkodását megszakítva érkezett haza szabadságra. Csak itthon jutott eszébe, hogy elfelejtett elintézni egy fontos dolgot az adott országban. Azonnal ír egy ottani ismerősének.

- Közölje vele, mióta van itthon, hogyan utazott.
- Magyarázza el, mit felejtett el elintézni, milyen következménye lehet mulasztásának.
- Kérje meg ismerősét, segítsen elrendezni a dolgot. Részletezze, mi a teendője.
- Telefonon értesítse önt, sikerült-e eljárni az ügyben.
- Majd viszonozza fáradozását. Tájékoztassa visszautazásának pontos idejéről.

7. Külföldi szomszédja hazautazott szabadságra. Levélben kérte önt meg egy szívességre. Most levélben tájékoztatja arról, mit intézett.

- Érdeklődjön, milyen érzés volt hazatérni hosszas távollét után.
- Részletesen tájékoztassa, hogyan oldotta meg a problémát.
- Mit kell barátjának tennie, ha visszaérkezik? Mikor és mivel érkezik?

8. Panaszkodjon levelezőtársának.

– Az utóbbi néhány napon a szomszédban lakásfelújítást végeznek (fúrnak, korán kezdik a munkát, késő estig dolgoznak).
– Átment szomszédjához, és megnézte, hogyan csempézik a fürdőszobát.
– Megkérte a szomszédját, hogy a munkások reggel héttől este hatig dolgozzanak.
– Megígérte, de már ma sem tartották be az ígéretet.
– Vígasztalásul ön zenét hallgat, bömbölteti a CD-je hangszóróit.

9. Írjon levelet barátjának (saját neve és címe mellőzésével!), melyben beszámol családja mindennapi életéről.

– Mutassa be családja tagjait.
– Ki mivel foglalkozik általában?
– Hol laknak, milyen a lakásuk?
– Milyen közös családi programjaik vannak?
– Milyen gyakran vannak együtt?
– Milyen házimunka az ön feladata?
– Jól van ez így?
– Mit csinálna másképpen?

10. Írjon levelet arról, hogy miért tanulja az olasz nyelvet.

– Az olasz kultúra (irodalom, művészetek) iránti vonzalma miatt döntött így.
– Valaki (ismerőse, barátja) is befolyásolta.
– Véleménye szerint az olasz nyelvtudás Magyarországon idegenforgalmi szempontból fontos.
– Kedveli az olasz zenét (zeneszerzőket, operákat).
– Dallamossága miatt hasonlít az eszperantóra. Szókincsében is vannak azonosságok.

11. Írja meg külföldi barátjának, hogy egy közvélemény-kutató cég megbízásából egy áruházban a vásárlókat fogyasztói szokásairól kérdezi.

– Általában mindenki siet, ezért viszonylag kevesen vállalják a beszélgetést.
– Legtöbben élelmiszert (kenyeret, felvágottat, tejet) vesznek.
– Az utóbbi időben minden árunak emelkedett az ára, de ez nem befolyásolja a fogyasztást.
– Sokan vesznek alkoholt, pedig káros a szervezetre.
– A megkérdezetteknek illatos szappant ad ajándékba.

12. Tanúnak idézik egy esemény kapcsán. Mesélje el levélben külföldi ismerősének, hogy

– mit látott, mikor, milyen körülmények között;
– mi a véleménye az esetről;
– hogyan és miért lett önből tanú;
– a bírósági tárgyalás hogyan zajlott le;
– milyen érzéseket váltott ki önből az eset.

13. Külföldi ismerőse érdeklődik, hogyan osztják be az otthoni munkát. Írja meg, hogy

– családjában milyen feladatokat osztottak meg egymás között;
– mi alapján történt a munkamegosztás;
– elégedett-e ön ezzel a munkamegosztással;
– mennyire szokásos Magyarországon az ilyen felfogás: mindenki segít mindenkinek.

14. Német barátja tízéves kisfiával két napot szeretne Budapesten tölteni.

– Ajánljon nekik valamilyen programot.
– A kisfiút nagyon érdeklik a kocsik (cirkusz, Halászbástya, Margit-sziget).
– Sorolja fel a főváros nevezetességeit!
– Ismertessen néhány éjszakai szórakoztató programot.
– Írja meg, hol szállásolja el őket.

15. Holland vendégénél tett látogatása után hazatért.

– Levélben köszönje meg a szívélyes fogadtatást.
– Véleményét kérték egy dologról. A háziak elmondták, hogy az udvart be akarják ültetni virággal.
– Javasolja, hogy feltétlenül hagyjanak szabad helyet gyermekeik számára, ahol játszhatnak, sportolhatnak. Ön szerint nem sok értelme van a kertes háznak, ha nincs lehetőség mozgásra.
– Ott nem akarta ezt elmondani, nehogy megsértődjenek. Kérjen elnézést őszinte véleményéért.

16. Igen fáradt mostanában. Írja meg ennek lehetséges okait barátjának.

– Munkahelyén sokkal többet kell dolgoznia. Indokolja meg, hogy miért.
– Egyetemre jár, havonta kétszer van konzultáció, folyamatosan vizsgázik.
– Szülei betegesek, rendszeresen gondoskodik róluk.
– Nem eszik rendszeresen, pedig ez káros az egészségére.
– Kérjen jó tanácsokat barátjától. Hogyan változtathatna életmódján?

17. Német ismerőse hosszabb időre az ön városába érkezik dolgozni. Arra kéri, tájékoztassa őt, milyen lakásbérleti lehetőségek vannak.

– Ajánlja fel segítségét (hirdetést ad fel, ingatlanközvetítőt keres fel barátja nevében stb.).
– Tájékoztassa arról, hogy a bérlőnek a rezsit is fizetnie kell (gáz, fűtés, villany, telefon, közös költség), ha valami elromlik, a javításokat is.
– Írja meg a viszonylagos árakat (kétszobás lakás bérleti díja, összes rezsiköltség, fizeté- si szokások – havonta, több hónapot előre kell fizetni stb.)

18. Két hónap múlva lesz az esküvője.

– Mutassa be vőlegényét/menyasszonyát.
– Köszönje meg ismerősének a néhány nappal ezelőtt küldött jókívánságait.
– Írja meg, hogy Velencébe mennek nászútra.
– Utána egy ideig az ön szüleinél fognak lakni, de fél év múlva kész lesz a saját lakásuk.
– Hívja meg ismerősét az esküvőre.

19. Munkahelyet változtatott. Írja meg ismerősének,

– miben különbözik jelenlegi munkája az előzőtől,
– milyenek az új kollégái,
– milyen segítséget kap tőlük munkájához,
– írjon új főnökéről,
– mennyivel keres többet, mint előző munkahelyén,
– milyen előrelépési lehetőségei lesznek,
– szokott-e közös rendezvény (névnap, születésnap) stb. lenni.

20. Írjon barátjának/barátnőjének kedvenc olvasmányáról.

- Miről szól a regény? Kik a főhősei? Jellemezze őket!
- Látta már a regény megfilmesített változatát is. Miben tér el a kettő?
- Kérje meg barátját, hogy írjon hasonló élményeiről.

****

Vélemény, információ írása

1. Vi ricevis reklampakaĵon perpoŝte. Nur via frat(in)o estis hejme, kiam alportis ĝin la poŝtisto. Li/ŝi pagis por ĝi grandan sumon. La pakaĵo estas peza kaj multekosta. Vi ege surpriziĝis, kaj pensas, ke certe okazis iu miskompreno. Vi ne malfermis la pakaĵon, ĉar vi volas resendi ĝin al la sendinta firmao.
Skribu la akompanan leteron, en kiu

a) vi raportas pri la pakaĵo
b) esprimu vian indignon pro la misuzo de via adreso
c) klarigu, kial vi resendas la pakaĵon
d) resendu vian monon
e) indiku viajn pluajn paŝojn, se ili ne repagus ĝin.

2. Via eksterlanda korespondamiko interesiĝis pri la hungara literaturo, teatro kaj kinoarto. En via respondo skribu

a) pri viaj kutimoj de legado
b) pri la teatra vivo de via loĝloko
c) pri via opinio koncerne hungarajn filmojn
d) pri tio, kiun rolon havas nuntempe la libroj, la teatro kaj la kinejo en la ĉiutaga vivo de hungaroj
e) vian proponon pri interesa hungara libro/filmo, donu motivojn de via elekto.

3. Vi promenis hejmen. Subite antaŭ viaj okuloj okazas akcidento. Aŭtomobilo koliziis kun biciklanto.Vi bone vidis ĉion. Laŭ via opinio la ŝoforo de la aŭtomobilo estis la kulpa. Vi estis atestanto antaŭ la polico. Alveninte hejmen vi skribas leteron al via amik(in)o pri la okazintaĵo. Skribu al li/ŝi

a) kio okazis sur la strato
b) kiujn kaŭzojn povas havi trafikakcidentoj, laŭ vi
c) kion oni povus fari por eviti akcidentojn
d) pri avantaĝaj kaj malavantaĝaj trajtoj de biciklo, motoro, aŭtomobilo kompare al la publika transporto
e) kiel vi trafikas en la urbo

4. Via amik(in)o vojaĝos al eksterlando la unuan fojon. Skribu al li/ŝi leteron, en kiu vi donu konsilojn, kiel ŝi preparu sin al la vojaĝo!
Parolu pri la necesaj dokumentoj, pagmanieroj, lingvouzado, kostoj, utilaj informoj pri la lando, kiun li/ŝi vizitos.

5. En esperantlingva gazeto oni aperigas serion de artikoloj pri la eduksistemo de diversaj landoj. Skribu artikolon pri la studeblecoj post la abiturienta ekzameno en Hungario! Informu la legantojn pere de via propra ekzemplo! Skribu pri viaj finitaj lernejaj studoj, via preferata profesio, la studoj, kiujn vi devos fari por atingi viajn celojn, la postabiturienta kurso/instituto, kie vi volas studi, la postuloj por akceptiĝi en tiu kurso/instituto.

6. Imagu, ke vi estas gimnaziano. En via lernejo okazis tago pri profesia orientiĝo, kiu instigis vin skribi pri tiu temo al via korespondamiko. En via letero traktu la sekvajn demandojn:
• kial estis facile/malfacile por vi elekti profesion
• kian helpon vi ricevis de via familio, geamikoj aŭ de via lernejo
• laŭ kiaj kriterioj oni elektas profesion (mono, prestiĝo ktp. ktp)
• kiuj kriterioj estas por vi la plej gravaj, kial
• kiel vi imagas vian laboron post 20 jaroj?

7. Via amik(in)o demandas vin pri via libertempo. En via respondo skribu pri tio,
- kiam, kie vi renkontas geamikojn, kion vi faras kune
- kiajn programojn vi rigardas en la televido, kial
- kiuj estas la plej ĝenaj bagatelaĵoj kiuj forrabas vian tempon
- kiujn gravajn taskojn vi havas, pro kiuj mankas al vi libertempo

8. Via amik(in)o demandis vin pri tio, kiel vi rilatas al lingvolernado. En via respondo skribu pri tio,
- kiujn lingvojn vi lernis ĝis nun, kie, kiel
- kiujn lingvojn vi parolus volonte, kial
- kiajn malfacilaĵojn vi havas dum lingvolernado
- kiuj metodoj estas por vi la plej taŭgaj
- kiam manko de lingvoscio kaŭzis problemon al vi; kion vi faris por solvi tiun problemon
****

9. Ismerőse blog bejegyzésében népszerűsíti a magyar konyha jellegzetes ízeit. Fejtse ki véleményét arról, hogy miért lehetnek ártalmasak a magyaros ételek.

10. Fejtse ki véleményét arról, ön szerint milyen a tartalmas szórakozás, művelődés, kikapcsolódás (színház, mozi, hangverseny, érdekes beszélgetések, utazások stb.).

11. Készítsen feljegyzést arról, miért és hogyan szeretné megvalósítani lakáscseréjét.

12. Érveljen szakmája, foglalkozása mellett.

13. Milyen embereket tart igaz barátjának? Jellemezze őket!

14. Véleményével segítsen megoldani ismerőse családi problémáját, aki kertet szeretne venni. Érveljen a vásárlás mellett.

Szövegértést ellenőrző feladatok magyar kérdésekkel

1.

La fino de Vincent van Gogh

Komence de julio 1890, Vincent van Gogh veturis la lastan fojon al Parizo por viziti sian fraton Theo, kiu jam dum pluraj jaroj finance kaj morale subtenis lin. Sed Theo kun sia edzino havis mem grandajn zorgojn. Lia fileto estis malsana, li bezonis monon kaj alian loĝejon kaj ne sciis, kiel li iros plu en sia profesia pozicio kiel artkomercisto en la entrepreno de Boussot kaj Valadon, kiuj arogante traktis lin kiel domserviston. Tial en la hejmo regis enorma tumulto. Vincent, kiu tie mem akceptis tro da diversaj pentristoj, estis konsternita de la situacio. Li reveturis laca kaj ekscitita al la vilaĝo Auvers-sur-Oise.

Tie li skribas en letero al la frato: „Post mia reveno ĉi tien mi estis ankoraŭ tre malĝoja kaj sentis ankaŭ sur mi mem la tempeston, kiu minacas vin". Kaj en plia letero: „...Kaj tio estas ĉio, aŭ almenaŭ la plej grava, kion mi povas diri al vi en tiu sufiĉe kritika momento. En momento, kiam la rilatoj inter komercistoj kaj bildoj de mortaj artistoj, kaj komercistoj kun bildoj de vivantaj artistoj estas tre streĉaj. Kaj mia propra laboro, nu, mi riskas la vivon ĉe tio kaj mia menso je duono estas ekstermita. Sed vi, kiel mi scias tion, ne apartenas al la homkomercistoj, kaj vi povas, kiel mi scias, defendi konvinkon kaj agi vere humane – sed kion oni faru?"

Spite al sia malespero Vincent laboras plu. Li pentras kvar grandformatajn bildojn, unu el ili estas la „Korvoj super la tritikokampo", kiun li pentris de la 7a ĝis la 10a de julio en 1890. Kion tiu morna bildo kaj multaj aliaj antaŭsignoj jam lasis diveni, okazis je la 27a de julio de la sama jaro; tamen neatendite por ĉiuj, kiuj kontaktis kun Vincent.

Emile Bernard al Albert Aurier: „Efektive li iris dimanĉe vespere al la rando de Auvers, metis sian pentristan stablon apud fojnostako kaj tiam pafis sin. Trenata de la skuiĝo, li falis teren (la kuglo penetris lian koron), sed li tamen stariĝis por reiri al la gastejo, kie li loĝis".
Adeline Ravaux [ravó], posedanto de la gastejo: „Ni staris antaŭ la dompordo por kapti iom da freŝa aero, kiam ni fine vidis lin veni; senvorte, kiel ombro, li preteriris nin. Per grandaj paŝoj li iris tra la gastejo supren, en sian ĉambron. Estis jam sufiĉe malhele, kaj nur mia patrino rimarkis, ke li aspektis kvazaŭ spertanta grandan doloron. Tuj poste ŝi diris al mia patro: "Rigardu, mi supozas, ke sinjoro Vincent fartas malbone." Mia patro iris supren. Li aŭdis ĝemojn. Ĉar la ŝlosilo troviĝis en la seruro, li eniris. Sinjoro Vincent kuŝis sur la lito. Li montris sian vundon kaj diris, ke li esperas, ke ĉi-foje la pafo ne preteriris".

Oni vokis la lokan kuraciston kaj lian amikon, doktoron Gachet [gaŝé]. La kuracisto pansis lin, sed ne povis forigi la kuglon. Vincent sidis la tutan tagon en la lito kaj fumis sian faman pipon. Li mortis en la matenaj horoj de la 29a julio, ĉeeste de sia afliktita frato Theo, al kiu Vincent verŝajne volis helpi per sia memmortigo, ĉar ja la bildoj de *mortintaj artistoj* pli bone vendiĝas, ol tiuj de vivantaj. La bonkora Theo, kiu tre amis sian fraton, tenis lian manon kaj aŭskultis liajn lastajn vortojn: „Mi dezirus, ke mi povu tiel morti!" Vincent van Gogh havis nur 37 jarojn, kiam li mortis. Gachet desegnis lin, kuŝantan en la mortlito.

Ĉar la katolika pastro de Auvers ne volis disponigi la mortulĉaron por memmortiginto, oni prizorgis ĝin el la najbara komunumo. Oni entombigis la pentriston en la tombejo de Auvers, alte super la tritikaj kampoj.

1. Miért nem tudott segíteni testvérén Theo?
Theo feleségével együtt korábban támogatta a festőt, de fiuk beteges volt, ezért Theonak pénzre és másik lakásra volt szüksége. Bizonytalan volt kereskedői vállalkozásának folytatása is.
2. Hogyan vélekedett a Vincent van Gogh kortársainak munkáiról?
Vincent elfogadta a különböző festőművészek megdöbbentő alkotásait.
3. Hogyan folytatta munkáját? Hány képet festett? Melyik a leghíresebb?
Vincent nem esett kértségbe és folytatta munkáját. Négy nagyalakú képet festett, egyik közülük „Varjú a búzamezők felett", melyet 1890. július 7-10. között készített.
4. Írja le a festő öngyilkosságának részleteit!
Elment az Auvers partjára, maga mellé tette festőállványát, és mellbe lőtte magát. A földre esett (a golyó a szívét érte), de mégis felállt, és visszament a vendéglőbe, ahol lakott.
5. Hogyan mesélte el a vendéglő tulajdonosa az esetet?
„Kint álltunk a ház ajtajában friss levegőt szívni. Amikor megláttuk, szótlanul, szinte árnyékként haladt el mellettünk. Nagy léptekkel ment fel a szobájába. Már elég sötét volt, és édesanyám megjegyezte: úgy véli, hogy Vincentnek nagy fájdalmai vannak. Apám felment az emeletre. Nyögéseket hallott. A kulcs a zárban volt. Vincent úr ágyban feküdt. Megmutatta a sebét."
6. Mit mondott a festő a vendéglősnek sebével kapcsolatban?
Azt mondta, reméli a lövést nem vétette el.
7. Mit csinált az orvos a sebbel?
Az orvos bekötözte a sebet, de a golyót nem tudta eltávolítani.
8. Hogyan segített a festő testvérén és családján?
Testvérét elszomorította, hogy Vincent egyedüli megoldásként öngyilkosságával tud segíteni, mert egy halott művész képei jóval többet érnek mint egy élőé.
****

2.

Kalocsay kaj Baghy en Ĉinio

Ekde la 20-aj jaroj ĉinaj esperantistoj ekprezentis alilandajn literaturaĵojn, precipe la orienteŭropajn, al ĉinaj legantoj per Esperanto.
En januaro 1929 Lusin kiel redaktoro de la gazeto Torento ricevis kontribuaĵon kun letero de iu nekonata junulo Sun Yong, kiu samtempe informis Lusin, ke li ĉinigis fabel-epopeon de Petőfi Sándor, Johano la Brava, el la esperanta traduko de Kálmán Kalocsay. Sun Yong petis helpon por eldoni sian tradukon. Lusin tuj respondis: "Se vi povas sendi la tradukitan epopeon, eble mi publikigos ĝin en la gazeto. Eldono nur en libra formo estas tre malfacila, ĉar nun legantoj de poemoj estas nemultaj kaj pro tio eldonejoj ne interesiĝas. Sed mi povas demandi al Beixin-Librejo, kaj se ĝi volos akcepti, tiam mi sciigos vin kaj vi povos rekte trakti kun ĝi."
Lusin mem tre ŝatis Petőfi, kelkfoje verkis pri ties vivo kaj verkado en siaj eseoj, eĉ propramane ĉinigis ses poemojn de Petőfi el la germana lingvo. Ricevinte la tradukojn, Lusin klopodis por ilia eldono. Li deziris, ke la ĉinaj legantoj povu ĝui la belajn versojn en bela prezento, eĉ skribis leteron al amiko studanta en Germanio por aĉeti eldonon kun ilustraĵoj. Dume li ankaŭ proponis al Sun Yong: "Ĉu ĉe via flanko troviĝas ebleco aĉeti tian eldonon kun ilustraĵoj pere de esperantisto en Hungario?" Sun Yung tuj ekkorespondis kun Kalocsay, la esperantiginto, kiu tre ĝojis akcepti la peton. Post serĉada strebo li sendis al la ĉiniginto 12 belajn kolorajn bildojn.
Lusin estis ravita. Li eĉ intencis represi laŭ la originaloj kolore, tamen la tro altan koston neniu eldonejo volis akcepti. Poste li turnis sin al gazeto kun propono de trikolora preso, kies kliŝojn li povus prunti por libroforma eldono; tion la gazeto rifuzis. Tiam eĉ Beixin-Librejo perfidis sian promeson eldoni la epopeon, pro timo de malprofito. Lusin kolere skribis al Sun Yong: "Eldonejoj ĉasas profiton, kio kaŭzas, ke al Ĉinio mankas bonaj libroj."

Lusin decidis per propra financo eldoni la epopeon je mil ekzempleroj kaj ofsete represi la bildojn. Fine malgranda eldonejo Hufeng-Librejo konsentis eldonon de la libro, postulante nur ke Lusin antaŭpagu por kliŝfarado kaj honorario al la tradukinto. Lusin konsentis tion. Post klopodado de jaro kaj duono la fabelo de Petőfi aperis antaŭ la ĉinaj legantoj.
Dum la korespondado kun Kalocsay, Sun Yong akceptis lian peton helpi pri la esperantigo de poemoj de Li Bai, la granda poeto de la Tang-dinastio. Sun detale klarigis al Kalocsay la enhavon kaj propran metrikon de elektitaj poemoj. Tiu kunlaboro trans landlimoj postlasis valoran beletran heredaĵon en la Esperanta kulturo: sep poemoj de Li Bai aperis unue en Literatura Mondo, poste en la poemaro Eterna Bukedo. Aliflanke Sun Yong ĉinigis poemojn de Petőfi el la tradukoj de Kalocsay, kiuj en 1951 en Pekino aperis kiel 40 poemoj de Petőfi. Poste, dank'al du hungaraj studentoj, kiuj studis en Pekina Universitato, Sun Yong ĉinigis pli ol cent poemojn de Petőfi, eldonitajn en la libro Poemoj de Petőfi (Pekino, 1959).
Bakin, fama ĉina verkisto, ekiris sur la literatura vojo per tradukoj el Esperanto. Post sia esperantistiĝo en 1924 li ĉinigis verkojn de E. Amicis, L. Tolstoj kaj Akita Ujaki el Esperanto; nur en 1927 li verkis sian unuan romanon, Pereo. Kiam en 1931 aperis la romano de Julio Baghy Printempo en la aŭtuno, ĝi tuj kaptis la animon de la juna Bakin, kiu publikigis ĉinan tradukon jam en 1932 ĉe Kaiming-Librejo, Shanghai. La koincidoj estas interesaj: Baghy verkis la romanon en unu semajno, Bakin tradukis ĝin en unu semajno, kaj ankaŭ en unu semajno en 1932 li verkis propran romanon sub ĝia influo, Aŭtuno en la printempo.
La romano de Baghy rapide havis fortan eĥon ĉe la ĉina legantaro, precipe la junularo. De 1932 ĝis 1981 tiu romano estis represita 17-foje. Multaj uzis kaj uzas ĝin por ellerni Esperanton kaj la tradukarton.
La granda hungara ĝemelstela paro Baghy kaj Kalocsay multe kunlaboris al nia Esperanta kulturo,sed ankaŭ sur la paĝoj de la ĉina literaturo estas gravurita ilia merito.
****

˘Válaszoljon magyarul a kérdésekre!

1. Ki Lusin? Életművében milyen szerepe volt Petőfinek és mit tett, hogy Kínában megismerjék Petőfit? (8 pont)
2. Mit fordított le Sun Yong? (2 pont)
3. Sun Yong nem tudott magyarul. Hogyan értette meg Petőfi műveit? (4 pont)
4. Mit küldött Kalocsay Sun Yong-nak? (2 pont)
5. Mit kért Kalocsay Sun Yong-tól, mi lett az együttműködés eredménye? (4 pont)

****

MEGOLDÁS

1. Ki Lusin? Életművében milyen szerepe volt Petőfinek és mit tett, hogy Kínában megismerjék Petőfit? (8 pont)
– a Torento c. lap szerkesztője;
– nagyon szerette Petőfit / esszéiben írt Petőfi életéről és műveiről
– néhány versét lefordította németből
– küzdött a János vitéz kiadasáért, saját költségén rendelte meg egy kiadónál
2. Mit fordított le Sun Yong? (2 pont)
– számos Petőfi-verset
– a János vitézt
3. Sun Yong nem tudott magyarul. Hogyan értette meg Petőfi műveit? (4 pont)
– Kalocsay eszperantó nyelvű fordításai alapján
– két Pekingben tanuló magyar diák segítségével
4. Mit küldött Kalocsay Sun Yong-nak? (2 pont)
– 12 színes illusztrációt
5. Mit kért Kalocsay Sun Yong-tól, mi lett az együttműködés eredménye? (4 pont)
– segítsen Li Bai műveinek fordításában / Sun Yong elmagyarázta a kiválasztott versek tartalmát és metrumát
– hét vers megjelent a Literatura Mondo-ban, majd egy gyűjteményes kötetben

3.
Mia profesio estas stenografo

„Ĉu vere stenografo? Ĉu tiu ĉi profesio ankoraŭ ekzistas? Kial oni ne uzas sonbendon?" Multaj homoj ne kredas, ke junuloj hodiaŭ elektas tiun ĉi profesion. Kaj ili eĉ pli miras, kiam ili ekscias, ke stenografoj estas bone pagataj „tajpistaĉoj", kaj bone instruitaj specialistoj, kies ŝancoj sur la labormerkato estas elstaraj.
Nur ĉirkaŭ 200 virinoj kaj viroj en Germanio laboras kiel „parlamentaj kaj debataj stenografoj". Proksimume 25 el ili estas oficistoj de la Germana Federacia Parlamento, kies Stenografa Servo estas la plej laborkapabla kaj rapida en Germanio.
Ĉiam du stenografoj skribas samtempe ĉe sia tablo en la plenkunsidejo, kiu staras rekte antaŭ la oratora pupitro. Tie ili sidas vidalvide al la parlamentanoj kaj notas ne nur la paroladojn, sed ankaŭ elementojn de la debato, pri kiuj sonbendo ne informas: kiu aplaŭdas, kiu – kompreneble sen mikrofono – faras kiujn interrompajn rimarkojn?

La plej gravaj iloj tradicie estas skribilo kaj papero. Stenografi-tajpiloj neniam estis multe uzataj en germanlingvaj landoj. Avantaĝo de la tradicia manskriba stenografio estas, ke oni ne bezonas multekostajn ilojn por lerni ĝin kaj povas uzi ĝin ĉie. Skribilo kaj papero sufiĉas por fari notojn en lernejo aŭ universitato aŭ dum telefonado – aŭ simple por skribi aĉetliston.
Tradicie oni lernas tiun ĉi arton en lokaj stenografaj asocioj. Ankaŭ kelkaj gepatroj instruas ĝin al siaj infanoj. La parlamentoj do ne devas instrui la bazajn sciojn. Por eklabori en la Federacia Parlamento oni jam skribu almenaŭ 200 silabojn po minuto. Dum la trejnado en la parlamento oni plirapidiĝas al pli ol 300 silaboj. Komparu: per normala manskribo oni atingas nur 40 aŭ 50 silabojn.
Kromaj postuloj por tiu ĉi profesio estas bonega regado de la germana lingvo, kapabloj de rapida konceptado kaj intereso pri politiko. La stenografoj de la Federacia Parlamento krome ĉiuj finstudis en universitato en diversaj fakoj.
La stenografado estas nur la komenco de la laboro. La ĉefa parto okazas en la oficejoj, kie ĉiu stenografo surpaperigas helpe de komputilo sian eron de la debato. Li kontrolas la skribmanieron de nomoj, de personoj kaj asocioj, de leĝoj kaj dekretoj. Li korektas lang-erarojn kaj gramatikajn erarojn. Neniu atendas, ke la parlamentanoj, kiuj antaŭe nur notis kelkajn vortojn, faras pres-pretajn paroladojn. Parolado libera malsamas al skriba argumentado. Sed legantoj volas facile legeblan tekston. Tial la stenografo devas atente prilabori ĝin sen ŝanĝi la stilon aŭ eĉ la sencon. Por bone surpaperigi 5-minutan debateron oni bezonas ĉirkaŭ 50 minutojn.
Dua stenografo, nomata „revizoro", kontrolas la tajpitan tekston kaj sendas ĝin al la parolinto, kiu dum du horoj rajtas postuli korektojn, se io malĝustas. Sed veraj eraroj maloftas. Poste la stenografo metas la protokolon en la interreton*. Presita versio pretas je la mateno de la sekva labortago.
Krom la dungitaj stenografoj en la federacia kaj la landaj parlamentoj ekzistas ankaŭ memstaraj stenografoj, kiuj faras protokolojn de partiaj aŭ sindikataj kunvenoj, de kongresoj, procesoj kaj tiel plu.

** interreto: internet*

Válaszoljon magyarul a kérdésekre.

1. A Német Szövetségi Parlamentben hol van a gyorsírók helye, és mit jegyeznek le? (6 pont)

2. Milyen előnyökkel jár használatuk? (2 pont)

3. Milyen követelmények alapján választják ki a Szövetségi Parlament gyorsíróit? (6 pont)

4. A jegyzetelés után mi még a gyorsírók és ellenőrök feladata? (6 pont)

MEGOLDÁS

1. A Német Szövetségi Parlamentben hol van a gyorsírók helye, és mit jegyeznek le? (6 pont)
   - az ülésteremben
   - a szónoki emelvény előtt
   - szemben a képviselőkkel
   - saját asztaluk van
   - (nemcsak) a beszédeket
   - a vita olyan elemeit (is) lejegyzik, amelyekről a hangfelvétel nem ad információt (ki tapsol, ki tesz megjegyzést)

2. Milyen előnyökkel jár használatuk? (2 pont)
   - a tanuláskor nincs szükség drága felszerelésre
   - bárhol lehet használni

3. Milyen követelmények alapján választják ki a Szövetségi Parlament gyorsíróit? (6 pont)
   - percenként (legalább) 200 szótagot kell tudni leírni
   - kiválóan kell tudni németül
   - gyors fogalmazási készség
   - politikai érdeklődés
   - egyetemi végzettség

4. A jegyzetelés után mi még a gyorsírók és ellenőrök feladata? (6 pont)
   - (számítógéppel) leírják a szöveget / átírják jegyzeteiket
   - ellenőrzik a helyesírást (nevek, törvények stb.)
   - javítják a beszélő nyelvtani hibáit, nyelvbotlásait, élvezhető olvasmánnyá alakítják a beszédet
   - elküldik javításra a szónoknak
   - interneten közlik a jegyzőkönyvet

4.

Parolas Pekino

La 19-an de decembro 1964 eksonis voĉo de ĉinaj esperantistoj "Parolas Pekino" – la signalo de la Esperanto-disaŭdigo de Radio Pekino (nun ĈRI: Ĉina Radio Internacia). Komence ĝi okazis unu fojon semajne, nur al Orienta Eŭropo; nun kvar fojojn ĉiutage, respektive al Eŭropo, Orienta Azio, Sudorienta Azio kaj Latinameriko.

ĈRI estas ŝtata radio, kiu sin disaŭdigas al la tuta mondo en kvardek tri lingvoj. La Esperanto- sekcio raportas pri la reformoj kaj grandegaj ŝanĝiĝoj, gravaj atingoj de Ĉinio, konigas pri la longa historio, brila kulturo, riĉa literaturo kaj arto, diversaj moroj kaj kutimoj de Ĉinio. Ili rakontas ankaŭ pri la historio kaj nuna stato de la Esperanto-movado en Ĉinio kaj aliaj landoj. Germana aŭskultanto skribis: "Mi ĉiam fidele kaj plezure aŭskultas vian dissaŭdigon, kiu estas ne nur mia sprita ĝuo, sed ankaŭ grava kurso por lerni la ĉinan historion. Via disaŭdigo ege riĉigis mian scion, tiel ke mi ekhavis la fortan deziron: nepre vojaĝi al via lando…" Tiu aŭskultanto partoprenis la 71-an Universalan Kongreson okazinta en Pekino en 1986 kaj fine realigis sian deziron.

Iama prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, Usona profesoro Humphrey Tonkin laŭdis en sia disertacio pri Esperanto-disaŭdigo, ke la fonetika kvalito de Pekina Radio estas bona kaj meritas esti modelo de Esperanto-disaŭdigo por la tuta mondo. Iama ĝenerala sekretariino de UEA, hungara doktorino Flóra Szabó-Felső diris en iu prelego, ke la Esperanto-disaŭdigo de Pekino faris gravan kontribuon por diskonigi informojn pri Ĉinio, por propagandi la ĉinan kulturon, kaj plie, por apliki Esperanton en ĵurnalisma fako.

La Esperanto-disaŭdigo de ĈRI estas ĉiam amata de diverslandaj aŭskultantoj. Iuj el ili eĉ organizas aŭskultantajn grupojn aŭ klubojn, en kiu ili faris multe da laboro por interligi aŭskultantojn. Kelkaj aŭskultantoj okazigis ekspoziciojn; aliaj surbendigis la programerojn, kaj tiel la programoj de ĈRI fariĝis lerno-materialoj de multaj aŭskultantoj. Ankoraŭ pli multaj aŭskultantoj afable sendis gazetojn, ĵurnalojn, librojn, diktafonojn, kasedojn kaj diskojn por riĉigi la disaŭdigojn.

La Esperanto-sekcio de ĈRI estas laŭdata ankaŭ de la estraro kaj kolegoj de la radio pro sia elstara laboro. Ĝi estas honorita plurfoje kiel avangarda sekcio, kaj ĝiaj programeroj multfoje gajnis premiojn.

****

1. Milyen változások történtek a kínai eszperantó nyelvű rádióadásban (nevében, adássűrűségében, sugárzási területében)? (9 pont)

2. Mire késztették az adások egyik hallgatójukat, és hogyan valósult meg kívánsága? (2 pont)

3. A hallgatók milyen tevékenységekkel kapcsolódnak a rádióhoz? (9 pont)

5.

Pri la revuo “Kontakto”

La Esperanta revuo “Kontakto” estas eldonata ĉefe por junulara publiko, kaj enhavas artikolojn pri diveresaj temoj el la tutmonda, socia, kultura kaj arta vivo.
Ĝi aperas sesfoje jare, kaj ĝi estas legata en ĉirkaŭ naŭdek landoj. Individuaj membroj kaj patronoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (mallonge TEJO), ricevas "Kontakton" aŭtomate, sed eblas ĝin ankaŭ aboni. "Kontakto" estas aparte celata por instruistoj kaj komencantoj. Ĝuste pro tio parto de la artikoloj aperas en lingvaĵo facila, kaj tre facila; tio signifas kun limigita kvanto de vortoradikoj. Ĝenerale la revuo traktas plej diversajn temojn, ekzemple, politikon, historion, hobiojn, vojaĝojn kaj tiel plu.
Kutime ĉiu numero de "*Kontakto*" havas sian apartan temon aŭ emfazon, sed en ĉiu numero aperas ankaŭ alitemaj materialoj.
Oni notu tamen, ke ĝi ne estas primovada revuo, tial la raportoj pri diversaj Esperanto-aranĝoj, kutime ne estas publikigataj.
Kontakto nun serĉas novan redaktoron. Laŭ la anonco la taskoj de la redaktoro estas: elekti la ĉeftemojn, teni kontaktojn kun kontribuantoj kaj instigi ilin al verkado, kaj eventuale mem verki aŭ intervjui. Lian laboron helpos grafikisto, kiu respondecas pri la aspekto de la revuo. La redaktoro devas labori en sia hejmo, ĉar ne ekzistas aparta oficejo. La anonco ankaŭ diras, ke la redaktoro de Kontakto estu persono, kiu kun plezuro laboras per la lingvo.
Ŝi/li havu altan lingvonivelon en Esperanto. Akurata laborstilo, respekto de limdatoj, ĝustatempeco kaj elteno de laborintensaj periodoj estas kondiĉoj por sukcesa laboro. Ŝi/li havu bonan konon de la Esperanto-movado, kaj estu atenta observanto de mondaj kultura vivo kaj eventoj.
Kvankam ne estas nepraj kvalifikoj, tamen donas avantaĝon spertoj, akiritaj pli frue, kiel redaktoro aŭ ĵurnalisto, nacilingve kaj/aŭ Esperante. Oni devas sendi vivresumon, motivigleteron kaj ekzemplerojn de antaŭaj verkoj, artikoloj, redaktitaj revuoj kaj tiel plu al la oficejo de TEJO ĝis la dekvina de junio dumil dek.

****

1. **Milyen gyakran jelenik meg a folyóirat? (1)**

2. **Hogyan lehet hozzájutni a folyóirathoz? (2)**

3. **Milyen olvasóközönséget céloz meg a „Kontakto”? (2)**

4. **Milyen legyen az új szerkesztő? (5)**

5. **Mi a szerkesztő fő feladata? (5)**

6. **Mit kell beküldeni a jelentkezőknek és meddig? (5)**

6.

PRI JOHN BAŬER

John Baŭer naskiĝis en Jönköping en 1882. En tiu tempo la urboj estis malgrandaj kaj la arbaroj estis grandaj en Svedio.
Plaĉis al John vagadi en la arbaroj. Li plukis en siajn poŝojn ĉion: florojn, muskon, strangaspektajn ŝtonojn kaj stangetojn, kiujn li hejme desegnis.
En la profundaj arbaroj loĝis la troloj *(manók, koboldok).* Ili estas brunaj kaj verdaj kiel la arbaro mem. Granda ŝtono kun musko povus esti la kurba dorso de trolo.
John ne estis diligenta lernanto. Kontraŭe. Li dediĉis sin al desegnado de komikaj portretoj de siaj instruistoj en la matematika kajero. La samklasanoj ridis pro la desegnoj, sed la instruistoj malŝatis ilin.
16-jara li finis la lernejon kaj transloĝiĝis al Stokholmo, kaj tie li eniris pentrolernejon.
Baldaŭ oni povis vidi desegnojn de John Baŭer en gazetoj, kaj kiam li havis 19 jarojn li ilustris siajn unuaj fabelojn.
John vojaĝis al diversaj landoj, pentris kaj fariĝis pli sperta pentristo. Li edziniĝis al kurskamarado, kiu nomiĝis Ester. Ili ekloĝis en domo ĉe la lago Bunn en Smolando.
Estis ŝi, kiu pozis kiel modelo por preskaŭ ĉiuj liaj bildoj de fabelaj princinoj.
Oni multe laŭdis John pro siaj fabelaj pentraĵoj, tamen li imagis, ke la homoj malŝate rigardis lin, la pentriston, kiu pentris fabelojn.
Tial li intencis transloĝiĝi de Smolando al Stokholmo. Lia edzino ja ankaŭ pentris kaj en Stokholmo ambaŭ havus eblecon evoluiĝi, kaj tie John finus pentri trolojn.
Vespere la 22-an de novembro 1918 li enŝipiĝis sur ”Per Brahe” en Gränna kun sia 3-jara filo. La ŝipo havis pezan ŝarĝon − kudromaŝinojn de Huskvarna kaj bokalojn da fruktmarmelado de Gränna. Ŝtormegis, sed tamen la ŝipo komencis la vojaĝon kaj direktis sin norden sur la lago Vättern.
Ili neniam atingis havenon. En la malhela nokto en la forta vento la ŝipo renversiĝis, kaj iris al la fundo de la lago. Ĉiuj dronis.
****

Válaszoljon magyarul az alábbi kérdésekre:

1. Mit gyűjtött J. Bauer az erdőben és mit csinált vele? (6 pont)

2. Milyen színűek voltak a koboldok? (2 pont)

3. Milyen tanuló volt John, és mit csinált az iskolában? Hogyam viszonyultak ehhez osztálytársai és tanárai? (4 pont)

4. Mi történt 1918. november 22-én? (8 pont)

7.

La boatisto

Ĉi-loke la rivero estis malrapid-flua. La boatisto ĉiutage aŭrore aliris la bordon. Tiam ankoraŭ ne estis pasaĝeroj; li haltis antaŭ sia domo, rigardis unue supren al la kurbiĝo, poste suben, al la alia kurbiĝo de la rivero.

La urbo estis malproksima, la unuaj pasaĝeroj alvenadis antaŭtagmeze. Iuj perpiede, iuj bicikle. Kun pakaĉoj surdorse ili iris al la vendoplaco de la urbo.

La grandan boaton antaŭ nelonge konstruis la boatisto mem, kaj bone konis ĝin – ĉiun ĝian movon, kutimon li konis. Neniam li lasis la boaton subsune. Ĉiam li ligis ĝin al ombroj domaj arbegoj bordaj.

La homoj en tiu provinco estis malmultvortaj. Ili havis sunbrunigitajn haŭton, rapidemajn piedojn, kaj neniam ili iris kun malplenaj manoj. Portis ili korbojn, sakojn, puŝis biciklojn aŭ ĉareton. La boata vojo daŭiris nur kelkajn minutojn. La rivero ĉi tie ne estis larĝa.

Kontraŭborde sur ŝtona kolono pendis peco de relo kaj alĉenigita fero. Se alvenis iu pasaĝero, li devis gongi. La bruo sonis malproksimen super la akvo.

Dum fluo de jaroj la boatisto spertis la sonojn. Jam rekonis la gongadon de certaj konstantaj pasaĝeroj.

La pasaĝeroj tri jarojn pli frue la unuan fojon menciis la ponton. Ili rakontis, ke la estraro decidis: estu ponto inter la du bordoj, kiu kunligu ilin! Poste diris la pasaĝeroj: rande de la urbo oni jam eĉ signis la lokon de la ponto. Printempe, somere ĉiu pasaĝero menciis la ponton.

Oni jam konstruas al la ponto novan vojon. Aŭtune alvenis per aŭte du viroj, nigre vestitaj. La boatisto suspekteme rigardis ilin. La urbanoj estis oficistoj, kaj pridemandis lin. “Kiom da jaroj vi havas? Ekde kiam vi estas boatisto? Ĉu la boato apartenas al vi?”

Unu el la oficistoj notis ĉion sur papero. Poste ili diris: ”Nu, sinjoro boatisto, alvenis la tempo. Baldaŭ vi povos fini la boatadon, vi ricevos pension.“

“Jes, ja, printempe la ponto estos preta. Mi jam ne estos bezonata, mi povos ripozi.”

****

1. **Milyen volt a folyó? (1)**
2. **Mikor és hová ment a révész minden nap? (2)**

3. Hogyan érkeztek az utasok? (3)

4. Hová igyekeztek az utasok? (2)

5. Mi jellemezte a vidéki embereket? (8)

6. Miért épült a híd? (1)

7. Mit kérdeztek a révésztől a hivatalnokok? (3)

****

8.

Pri Lajos Kossuth

Juna, talenta kaj ambicia advokato, Lajos Kossuth estis fondinto de la nobela kasino. Li laboris kiel notario de Sátoraljaújhely.
Dum 1832-36 la hungara reforma, liberala opozicio unuafoje ekluktis por la burĝigo, kontraŭ la absolutisma politiko de la Habsburga imperio. Tiam Kossuth eldonis manskribaĵon „Parlamentaj Sciigoj", kaj sendis ĝin kiel privatan leteron al la abonantoj.
Post la fermo de la parlamento en 1836 li resumis la kunsidojn de departemento Pest. Tiu eldonaĵo funkciis kiel opozicia gazeto. En aprilo 1837 oni arestis Kossuth-on kaj juĝis lin je kvarjara prizono. En la prizono Kossuth analizis politikon, ekonomion, lernis lingvojn. Li liberiĝis en majo de 1840 pro amnestio, danke al Ferenc Deák.
Kossuth iĝis ano de tiu 100-membra parlamenta komisiono – elektita la 15-an de marto –, kiu kunportis postulojn al la Viena registaro. La leĝoj alportis ŝtatan sendependecon de Hungario, respondecan registaron kaj tujan servutulan liberigon. En la registaro de grafo Lajos Batthyány (la nova hungara ĉefministro), Kossuth ricevis ministerion pri financaj aferoj.
Komence de oktobro 1848 Kossuth organizis la hungaran kontraŭstaron, armeon, kiu batalis sukcese en printempo 1849.
Kiam la Rusa Imperio invadis Hungarion kaj nia lando estis preskaŭ tute venkita, Kossuth elmigris al Turkio.
Poste li rondvizitis Usonon kiel „gasto de la nacio" kaj kolektis monon por aĉeti armilojn.

Dimanĉe, kiam ni renkontiĝos, mi transdonos al vi mian surprizon, kiun mi aĉetis al vi okaze de via naskiĝtago.

Ĝis tiam mi deziras al vi ĉion bonan!

Debrecen, la 22-an de julio 2016

Kun esperantistaj salutoj:

Maria

Levél (7.)

1. **Hétvégére kirándulást terveztek barátaival a hegyekbe. (Hogyan képzelte el a napot?)**
2. **Szombaton elromlott az idő.**
3. **Vasárnap délelőtt írt egy levelet ismerősének, aki nem akart önökkel kirándulni. Írja le a részleteket.**
4. **Változott a program. Színházba mentek. Ön vette meg a jegyeket.**
5. **Hogyan sikerült a nap?**

Kara Helena!

En via lasta letero vi demandis, kiel mi pasigis mian liberan tempon semajnfine. Tiu demando estas aktuala ankaŭ nuntempe. Mi sidas en mia ĉambro. Estas la 11-a horo antaŭtagmeze.

Sabate kaj dimanĉe mi volis ekskursi kun miaj geamikoj. Vi scias, ke la realiĝo de tiu programo dependas de la vetero. Ekpluvis kaj ni ne povis efektivigi nian planon. Ni estus dezirintaj veturi al la montaro Bükk. Ni estus grimpintaj montpintojn, manĝintaj en restoracio, apud kiu troviĝas fiŝlageto. Miaj geamikoj ŝatas fiŝhoki, promenadi, ĝui la naturon. Endre kutimas fiŝhoki grandajn silurojn kaj ezokojn.

Rigardante tra la fenestro mi vidas, ke la ĉielo estas griza kaj pluvas senĉese. Pasintsemajne ni prokrastis tiun ekskurson, kaj ni volus efektivigi ĝin sekvontsemajn-fine. Sabate matene mi interparolis kun miaj geamikoj pertelefone, kaj ni konstatis kun malĝojo, ke ni devos ŝanĝi nian programon.

Ni decidis rigardi teatraĵon en la Teatro Pesti. Mi mendis ok biletojn por la 19-a horo. Tiam komenciĝis la dramo „Hamlet” de Shakespeare. Ni renkontiĝis je la sesa kaj duono en la teatro. Poste ni vespermanĝis en la restoracio „Pallas”. Tie oni kuiras kaj fritas bone. (Mi konas persone la ĉefkuiriston de la restoracio. Iam li estis la plej bona amiko de mia patro.)

Ni pasigis neforgeseblajn horojn kune – sen ekskurso.

Mi deziras al vi bonan veteron, por ke vi povu pasigi vian liberan tempon sub la ĉielo.

Debrecen, la 23-an de junio 2016

Ĉion bonan deziras al vi

via amikino
Annamária

Levélírási témák

1. Házuk lakói nevében írjon egy panaszos levelet a polgármesteri hivatal szabálysértési osztályának.
   – Az önök melletti épületet több hónapja renoválják.
   – Szóban és írásban többször kérte az építésvezetőt, hogy a járdán lévő építőanyagot (deszkákat, köveket, sódert) távolítsák el.
   – Mivel a járdából legalább 80 métert lezártak, ezen kívül 20 méter hosszan építőanyagot tárolnak, nem lehet ott közlekedni.
   – Az ott lakók – elsősorban idős emberek – arra kényszerülnek, hogy az úttesten menjenek a buszmegállóig. Ez pedig veszélyes, mert nagy a forgalom.
   – Kérjen helyszíni szemlét és azonnali intézkedést.

2. Ön külföldi és Magyarországon autót szeretne bérelni. Barátjától levélben érdeklődjön.
   – Milyen típusú kocsit érdemes bérelni és miért?
   – Mennyi a napi bérleti díj, kilométerpénz, biztosítás?
   – Mennyibe kerül az üzemanyag?
   – Kinek kell javíttatnia a kocsit, ha meghibásodik?
   – Kérdezze meg, jár-e kedvezmény, ha hosszabb időre bérli az autót.

3. Írja meg panaszát egy külföldi utazási irodának.
   – Az idegenvezető programváltozást jelentett be.
   – Kifogásolja, hogy önt nem érdekli a városi múzeum, hajókirándulásról volt szó.
   – Arra fizetett be.
   – Ne elégedjen meg azzal, hogy az utazási iroda visszatéríti a kirándulás árát.
   – Kérjen kártérítést, vagy egy újabb lehetőséget a hajókirándulásra.
   – A múzeumi belépő és a hajókirándulás költsége, élménye között óriási eltérés van.

4. Külföldi ismerőse megírta önnek, hogy kislánya elvesztette az aranygyűrűjét, amit születésnapjára kapott.
   -- Azzal bünteti a gyereket, hogy nem engedi el az osztálykirándulásra.
   – Megfenyegette, hogy soha többet nem vesz neki ajándékot.
   – Önt mindez felháborítja. Vegye védelmébe a gyermeket.
   – Érveljen a helyes nevelés mellett.

5. Német barátjának a fiát, Gustavot jól ismeri.
   – Javasolja neki, hogy érettségi után jelentkezzen az orvosi egyetemre, mert ön szerint kiváló orvos lehetne.
   – Érvei között szerepeljen az, hogy jól tudja a biológiát és a fizikát.
   – Szeret gondoskodni a gyengébbekről, a betegekről.
   – Gyermekkora óta mindenkin segített, aki erre rászorult, sőt egy természetgyógyász tanfolyamot is elvégzett.

6. Egy hónappal ezelőtt jelentkezett egy bébiszittert kereső hirdetésre. Nem kapott választ.
   – Röviden utaljon előző írásbeli jelentkezésére (írjon magáról adatokat).
   – Udvariasan kérdezzen rá, miért nem kapott választ.
   – Kérdezze meg, mi alapján döntöttek vagy döntenek.

7. Egy híres angol szemorvosnak ír levelet.

- Az orvos különleges eljárását a napokban mutatták be a tévében.
- Rövidlátókat operál, akik a műtét után könnyen és gyorsan gyógyulnak meg.
- Az egyik családtagjának hasonló műtétre lenne szüksége. Kérdezze meg a feltételeket (ár, időtartam stb.).
- Milyen leleteket kell beszerezni előzetesen?

****

1. **Elektu unu el la subaj du temoj kaj skribu laŭ ĝi leteron.**
   Via letero enhavu ĉiun postulitan informon. Ne forgesu la formalaĵojn de la letero (alparolo, saluto, dato, subskribo).

   A) Vi deziras korespondi kun eksterlandanoj, tial vi aperigis anoncon. Vi ricevis mallongan leteron
   el Kubo. Respondu al tiu letero. En via respondo

   - prezentu vin kaj vian familion
   - skribu pri tio, kie vi laboras / studas
   - prezentu mallonge vian loĝlokon
   - skribu pri viaj ŝatokupoj
   - demandu, kio interesas vin pri via nova korespondamik(in)o.

   B) Skribu leteron al via amik(in)o pri tio, ke via filo havis naskiĝtagon. En via letero skribu,

   - kiam kaj kie okazis la festo
   - kion li petis de vi kaj kion li ricevis fine
   - kial - kiujn vi invitis,
   - kial - kio estis la programo kaj la menuo
   - kiel via familio kutimis festi vian naskiĝtagon en via infanaĝo.

2. **Elektu unu el la subaj du temoj kaj skribu laŭ ĝi leteron.**
   Via letero enhavu ĉiun postulitan informon. Ne forgesu la formalaĵojn de la letero (alparolo, saluto, dato, subskribo).

   A) Via amik(in)o venos al via lando. Vi tre ĝojas pri tio, sed bedaŭrinde en la tempo, kiam li/ŝi alvenos, vi ne estos libera. Skribu al via amik(in)o,

   - kial vi ne povos atendi lin/ŝin en la stacidomo
   - kiu atendos lin/ŝin anstataŭ vi, kiel aspektas tiu persono
   - kaze de problemo kiel li/ŝi povas atingi vian loĝejon
   - kiajn vidindaĵojn li/ŝi povus viziti sola kaj kiajn komunajn programojn vi planas.

   B) Via korespondamik(in)o demandis vin pri via libertempo. En via respondo skribu,

   - kiom da liberaj tagoj vi havas dum la jaro
   - kiam kaj kie vi kutimas pasigi vian libertempon
   - kiam, kiel vi volus pasigi viajn feriojn ĉi-jare/aŭ sekvontjare
   - kiel, kun kiu(j) vi pasigis la lastan someron
   - se vi havus pli multe da mono / tempo, kie vi ripozus.

****

Vélemény, információ közlése

1.

Fejtse ki véleményét az eszperantóval kapcsolatos előítéletekről.

- Az eszperantó nem nyelv. Ha mégis, háttérbe akarja szorítja a többi nyelvet.
- Nincs országa, politikája, hadserege, hatalma. Mégis erőszakosan terjesztik. Ezért kell inkább a világnyelveket tanulni.
- Nem használható semmi másra, csak arra, hogy a hallgató egy sikeres nyelvvizsga után megkaphassa a diplomáját.
- Nem természetes nyelv, egy ember alkotta meg ezt a műnyelvet.
- Akkor inkább már használjuk az „eszperente” nyelvet! Az legalább magyarul van, és nálunk mindenki megérti.
- A vizsgázókon kívül aligha beszélik mások a nagyvilágban, tehát nem alkalmas a kommunikációra: nincs irodalma, tévécsatornája.

MEGOLDÁS

Esperanto ne estas tia lingvo, kia ekzemple la angla, germana kaj la itala. Ili povas esti gepatraj lingvoj. La Internacia Lingvo ŝatus esti nur la dua lingvo de ĉiu homo en la tuta mondo. Esperanto havas avantaĝon kaj malavantaĝon: ĝi ne havas memstaran ŝtaton, politikon, armeon, ekonomian potencon. Tiuj karakteroj estas ĝiaj kontraŭdiraj kvalitoj. Certe, oni ne povas kaj ne volas plivastigi ĝin perforte. Esperantistoj reprezentas la pacon, interamikiĝon, kompremon inter la homoj de diversaj nacioj. Ili ne volas batali. Tiu lingvo estas uzebla en ĉiu tereno de la vivo: oni povas rigardi tovon, aŭskulti informojn, rigardi hejmpaĝojn, viziti konferencojn, kongresojn, vojaĝi eksterlanden, interparoladi kun alilandanoj.

Tiun lingvon verkis Ludwig Zamenhof, pola kuracisto, sed dum sia ekzisto (dum 130 jaroj), ĝi evoluiĝis tiel, kiel la naciaj lingvoj, do ĝi fariĝis viva lingvo. Oni diras, ke ĝi estas artefarita lingvo. Verŝajne ĝi estis artefarita lingvo, sed nun ĝi evoluas: ĝia gramatiko estas tre simpla, en ĝi estas multe da internaciaj vortoj, ĉefe el la latinaj lingvoj. Ĝi estas belsona kaj oni povas esprimi ĉion en tiu lingvo.

En la tuta mondo Esperanto estas parolata de ĉirkaŭ kvin milionoj personoj. Ĝi havas propran literaturon, radiostaciojn kaj televidkanalojn.

Ofte okazas, ke hungaroj ne povas ellerni la anglan lingvon dum 6-7 jaroj, sed en Esperanto ili sukcesas jam dum 4-6 monatoj. Tio estas granda diferenco. Ankaŭ mi

lernas (lernis) tiun lingvon. Nun mi povas legi romanojn, poemarojn, ĵurnalojn, gazetojn. Dufoje mi renkontiĝis kun eksterlandaj esperantistoj, kaj mi havis belegajn impresojn.

Oni eldonis en Esperanto amasoj da libroj, gazetoj, magazinoj. Ĉiuj povas elekti el ili en grandaj mondaj bibliotekoj, en la interreto. En Ĉinio „Johano la Brava" (János vitéz) estis tradukita ne el la hungara, sed el la Esperanta lingvo.

Esperanto fariĝas pli kaj pli populara ankaŭ en Hungario, ĉar la studentoj povas ekzameniĝi pri ĝi, kaj tiel ili povas akiri sian diplomon en la universitatoj, altlernejoj. Ili scias jam, ke pere de tiu lingvo ili povas vojaĝi multe, legi fakliteraturon, partopreni fakkonferencojn ktp.

****

2.

Használja fel az alábbi irányítási szempontokat!

Magyarországon igen sokan válnak el. Ennek számos oka lehet.
Részletezze ezeket az okokat konkrét példákkal!
Házasság előtt és után a fiatalok nem ismerik meg egymást eléggé.
Kiabálnak, veszekednek, ritkán beszélgetnek stb..
Olykor italozásba menekülnek; jobban kedvelik baráti társaságukat, mint családtagjaikat.
Előfordulnak nézeteltérések a szülőkkel. (Két különböző nemzedékről van szó.)
Lakás (hitelfelvétel, törlesztés, együttélés a szülőkkel stb.)
Egyéb megjegyzés, észrevétel a témával kapcsolatban.

Debrecen, la 1-an de februaro 2017

Kara Anna!

Pardonu, ke mi ĝenas vin. Mi esperas, ke vi ricevis mian lastan leteron, kvankam vi ne respondis longe.
Ofte oni povas aŭskulti en la televidado, ke multaj eksgeedziĝas, eksgeedziĝis dum la lastaj jaroj. Laŭ mia opinio la familio estas la plej grava afero en la vivo, kiu konsistas el edzo, edzino kaj gefiloj.
Mi estas edziniĝinta jam de deknaŭ jaroj, kaj mi havas du filojn.
Laŭ mia opinio, la kaŭzoj de la eksgeedziĝoj estas sekvaj.
Ofte la familianoj ne komprenas unu la alian. Granda problemo estas, ke la edzo aŭ la edzino estas malfidela. Se la gepatroj devas disigi, tio kaŭzas grandajn problemojn en la vivo de infanoj.
Oni devas fondi familion nur post serioza decido kaj longa pripensado. Gejunuloj devas ekkoni unu la alian profunde antaŭ la geedziĝo, poste ili ne havas grandajn

problemojn, kiujn rezultus eksgeedziĝon.
Junuloj ŝatas vojaĝi, ili ŝatas ĝui la vivon, viziti amuzejon, kinejon, diskotekon, trinkadi alkoholaĵon, malŝpari monon. Gepatroj havas multe da vivsperto, tial ili atentigas siajn gefilojn.
Se du aŭ tri generacioj vivas kune, tiam ili devas esti toleremaj, paciencaj kaj paciĝemaj. Grava faktoro estas komunaj havaĵoj (posedaĵoj) ĉe la eksgeedziĝo. Antaŭ ekonomia krizo multe de homoj ricevis krediton. Bedaŭrinde okazas ofte, ke ili ne povas pagi partopagojn.
Mi opinias, ke la plej granda feliĉo estas en la tuta mondo, kiam oni havas feliĉan, pacajn familiojn.
Mi esperas, ke antaŭ vi konsentas kun mia opinio.
Bonvolu, transdoni miajn salutojn al viaj gepatroj.
Mi finas mian leteron, se vi havos eblecon tiam reskribu al mi.

Kun amikaj salutoj:
Petro

****

1. Viaj familianoj volus ripozi ĉe Balatono en julio. Tiu plano ne plaĉas al vi, ĉar vi libertempis ĉe la hungara maro minimume dekfoje. Proponu ripozon eksterlandan. Nomu la landon, urbon. Kial vi volus ripozi tie? Priskribu la detalojn de via ferio.

2. Esti feliĉa -- tio estas unu el la plej grandaj valoroj de la homo. Kiam kaj kie vi estis la plej feliĉa en via vivo?

3. Kion vi pensas pri la medioprotektado? Kion vi povas fari konkrete por protekti la naturon?

4. Via konato plendas pri sia filo, ĉar li kondutas malbone, malĝentile. Ofte la patro batas sian filon. Opiniu pri tio!

Szövegértést ellenőrző feladatok magyar kérdésekkel

Szöveg (1.)

A fenti szöveget nem kell lefordítani, csak az alatta lévő kérdésekre kell válaszolni. Fordítást mégis elolvashatjuk. Ez a gyakorlást és a megértést egyaránt szolgálja.

Biografio de Zamenhof

Kara Sinjoro!

Vi petas, ke mi donu al vi detalojn pri mi kaj pri mia vivo. Tre volonte mi tion ĉi faros, kiom mi povos, sed bedaŭrinde mi povos fari ne tre multe. Jen estas miaj kaŭzoj: por la estontaj generacioj mia biografio eble estos ne seninteresa, ĉar efektive mia tuta vivo, de la plej frua knabeco ĝis nun, prezentas konstantan kaj seninterrompan serion da diversaj bataloj.

A) Interne en mi konstante batalis reciproke diversaj idealoj kaj diversaj celadoj, kiuj ĉiuj egale estis por mi ordonaj, sed kiujn reciproke interkonsentigi estis treege malfacile, kaj tio ĉi multe min turmentadis.

B) Ekstere mi ofte devis bataladi kontraŭ diversaj malhelpoj, ĉar neniam miaj idealoj apartenadis al la idealoj en modo, kaj tial neniam mankis al mi mokantoj kaj atakantoj. Krom tio mi tre multe da jaroj havis grandajn kaj tre turmentajn klopodojn kun la akiro de mia pano, kaj tiu ĉi batalado pri la pano tre venenis mian vivon. En la lastaj jaroj mi fine atingis tion, ke pano jam al mi ne mankas: sed, ho ve, la longa batalado min tre lacigis, kaj nun, ne havante eĉ plenajn 46 jarojn, mi jam sentas min kiel homo 60 jara.

Mi naskiĝis en urbo Bialystok, la 15-an de decembro 1859. Mia patro (marĝene: kiu ankoraŭ vivas) kaj avo estis instruistoj de lingvoj. La homa lingvo estis por mi ĉiam la plej kara objekto el la mondo. Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukita, t.e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro; mi revis iam fariĝi granda rusa poeto (marĝene: en la infaneco mi skribis diversajn versaĵojn, kaj en la 10-a jaro de mia vivo mi skribis 5-aktan tragedion). Kun plezuro mi lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili interesadis min ĉiam pli teorie ol praktike; kaj ĉar mi neniam havis la eblon ekzerciĝadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per miaj okuloj, sed ne per mia buŝo, tial mi flue parolis, legadis nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane); la lingvon francan mi legas facile, sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio en diversaj tempoj mi lernis iom ankoraŭ ĉirkaŭ 8 aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie.

En mia infaneco mi amis tre pasie la lingvon rusan kaj la tutan rusan regnon; sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke mian amon oni pagas per malamo, ke ekskluzivaj mastroj de tiu lingvo kaj lando (malgraŭ ke mi kaj miaj avoj kaj praavoj naskiĝis kaj laboris en tiu ĉi lando), ĉiuj malamas, malestimas, kaj premegas miajn fratojn, mi vidis, ke ankaŭ ĉiuj aliaj rasoj loĝantaj en mia urbo sin reciproke malamas kaj persekutas… kaj mi multe suferis de tio, kaj mi komencis revadi pri tia feliĉa tempo, kiam malaperos ĉiuj naciaj malamoj, kiam ekzistos lingvo kaj lando apartenantaj plejparte al ĉiuj siaj uzantoj kaj loĝantoj, kiam la homoj ekkomprenos kaj ekamos unu la alian.

Zamenhof életrajza

Tisztelt Uram!

Arra kér, hogy írjak magamról és életemről néhány részletet. Szívesen megteszem, amit kíván, de sajnos nem írhatok nagyon sokat. Íme az okaim: a jövendő generációk számára életrajzom nyilván érdektelen lesz, mert egész életem valójában – kisgyermekkoromtól mostanáig – különböző küzdelmek folyamatos és állandó sorozata volt.

A) Bensőmben szünet nélkül különböző ötletek és célok küzdöttek egymással, amelyek számomra egyforma mértékben normálisnak tűntek, de amelyeket összeegyeztetni gyakran rettenetesen nehéznek bizonyult, s emiatt sokat gyötrődtem (szenvedtem).

B) A külvilágban gyakran kellett felvennem a harcot különböző akadályokkal, mert elképzeléseim sohasem tartoztak a nagyvilág által elfogadott ideálok közé, s így mindig jelen volt életemben a gúnyolódás és a támadás. Ezenkívül nagyon sok éven át kenyerem megszerzéséért nagy és kegyetlen harcot folytattam, és ez a küzdelem a kenyérért megmérgezte az életemet. Az utóbbi időben ténylegesen sikerült elérnem, hogy kenyerem már nem hiányzik, de ó, jaj (istenem) e hosszú küzdelem kifárasztott, és most, amikor még 46 éves sem vagyok, 60 éves embernek érzem magam.

Bialystokban születtem 1859. december 15-én. Apám (zárójelben: még él) és nagyapám nyelvtanárok voltak. Az emberi nyelv számomra a világon mindig a legkedvesebb tárgy volt. Legjobban azt a nyelvet szerettem, amelyen felneveltek, vagyis az orosz nyelvet; nagy örömmel tanulmányoztam; arról álmodoztam, hogy egyszer híres orosz költő leszek (mellesleg: gyermekkoromban különböző verseket és 10 éves koromban egy ötfelvonásos tragédiát írtam). Nagy gyönyörűséggel tanultam más nyelveket is, de mindig inkább elméleti, mint gyakorlati vonatkozásaik érdekeltek; s mivel sohasem volt lehetőségem gyakorlásukra, s mivel csak szememmel olvasgattam, nem a számmal, ezért folyékonyan csak három nyelven beszéltem (oroszul, lengyelül és németül), franciául könnyedén olvastam, de beszélni keveset és rosszul tudtam; ezenkívül különböző idő alatt tanultam még nyolc más nyelvet, amelyeket csak nagyon rosszul és csak elméletileg ismerek.

Gyermekkoromban szenvedélyesen szerettem az orosz nyelvet és az egész orosz birodalmat; de hamarosan meggyőződtem arról, hogy szeretetemért, gyűlölettel fizetnek, hogy ennek a nyelvnek és országnak kivételes mesterei ugyan embereknek nevezik magukat, de bennem egy jogfosztott idegent látnak (annak ellenére, hogy én és nagyapáim, dédapáim ebben az országban születtek és éltek), mindenki gyűlölt, megvetett, és elnyomta testvéreimet; láttam, hogy a városomban lakó összes más nemzetiségű kölcsönösen gyűlöli és üldözi egymást… és én sokat szenvedtem ettől, és elkezdtem ábrándozni arról a boldog időről, amikor eltűnnek a nemzeti gyűlölködések, amikor egy olyan nyelv és ország létezik majd, amely nyelv használói és ország lakói legnagyobbrészt összetartoznak, amikor megértik és megszeretik egymást.

1. *Miért írt életéről Zamenhof?* Azért, mert megkérték erre.
2. *Hány éves volt a levél megírásakor?* A levél megírásakor Zamenhof 46 éves volt (de megpróbáltatásokkal teli élete miatt 60 évesnek érezte magát).
3. *Hol és mikor született Zamenhof?* Zamenhof Lengyelországban, Bialystokban született (1859. december 15-én).
4. *Melyik három nyelvet beszélte legjobban?* Zamenhof a következő három nyelvet beszélte legjobban: orosz, lengyel és német.
5. *Mitől szenvedett Zamnhof kora ifjúságától kezdve?* Attól szenvedett, hogy szülővárosa különböző ajkú lakói gyűlölték egymást. Noha ő az orosz birodalomban nőtt fel őseivel együtt, mégis másodlagos állampolgárnak tekintették, gyűlölték, és az orosz állam képviselői egy jogfosztott idegent láttak benne. Elnyomták a lengyel népet.

Szöveg (2. A, B, C)
INFANLUDOJ

A) Perdita paradizo

Antaŭ kelkaj tagoj, promenante inter mia domo kaj la loka tombejo, mi rimarkis ion, kion (se mia memoro fidindas) mi laste vidis, kiam mi estis knabo. Temis pri kvadrataj fakoj krete desegnitaj sur la trotuaro. Evidente, infano aŭ infanoj ilin kreis pro ja antikva distraĵo, nome paradizludo, kiun PIV tiel difinas: „Ludo en kiu oni devas, starante sur unu piedo, puŝi ŝtoneton tra la fakojn de surtera desegnita plano ĝis la lasta nomata paradizo."

Mi ne scias, en kiom da landoj estas konata la paradizludo, sed ĝi havas nomon en diversaj eŭropaj lingvoj (france: *marelle* [marél]; hispane: *coxcojilla* [kokskoĥilja]; irlande *cleas na bacóide*; angle: *hopscotch* [hopskoĉ], ktp). Angla-nederlanda vortaro donas ekvivalenton *hinkelspeel* [hinklspil] por la angla nomo, kiu ne estas uzata en Skotlando, kie ĝi nomiĝas *peever* [piver]. Vidante la kretmarkojn sur la trotuaro, mi estis tuj nostalgie reportata al la (bedaŭrinde nun tre foraj) jaroj de mia juneco, kiun, pro konstanta migremo de miaj gepatroj, mi pasigis en diversaj eŭropaj landoj. Samtempe, tiuj kvadratoj estigis en mi ankaŭ iom da milda plezuro. Permesu, ke mi klarigu.

---

1. Mit látott a járdán a szerző?
2. Hogyan kell játszani az elveszett paradicsom nevű játékot?
3. Hogyan viszonyult a szerző ehhez a játékhoz?

B) Terapio

Pasintjare, kaj refoje ĉi-jare, mi estis malvolonte enkarcerigita pro grava okulo-malsano en oftalmologia malsanulejo. Malgraŭ tio, ke mia ĝenerala sano estis bona, mia terapio postulis masivajn dozojn da steroidoj. Ĉiu, kiu legis aŭ aŭdis raportojn pri misuzo de tiaj drogoj fare de atletoj, scias, ke steroidoj dumtempe nenormale plialtigas fizikan kapablecon. Ili igis min hiperaktiva, instigante min konstante piediri, eĉ dumnokte. Mi ne povis resti en mia ĉambro kaj nur dum kelkaj horoj de la nokto en mia lito.

La malsanulejo estas malgranda, sen lokoj por promeni krom en koridoroj. Post kelkaj semajnoj, mi konis preskaŭ ĉiun kahelon de la hospitala planko. Iun tagon mi renkontis en la koridoro alian pacienton, maljunan virinon, kiu, kiel mi, trovis malmultan distraĵon dum teda, kvankam feliĉe provizora, duonblindeco. Mi rimarkigis al ŝi, ke la plankokaheloj memorigas min pri la paradizludo, kaj tiel ekis konversacio pri infanludoj. Ni kune bedaŭris, ke laŭŝajne la tradiciaj infanaj amuzaĵoj ne plu estas praktikataj kaj ke oni ne plu vidas (almenaŭ en nia mondoparto) gajajn infanojn ludantajn sur la strato. La kialoj estas evidentaj: danĝera kaj ĉiam kreskanta trafiko kaj la minaco de infanŝtelado kaj seksatencoj.

Kontraste, la mondo de mia infaneco ŝajnis sekura kaj senzorga. Infanoj ne timis ludi sur la strato aŭ vagi longe ekster la vido de siaj gepatroj. Knabinoj ludadis paradizludon aŭ ŝnursaltis, kaj ofte dumlude kantis aŭ recitis rimaĵojn. Laŭsezone, knaboj ludis per rulringoj, turboj aŭ kajtoj.

---

1. Milyen betegségben szenvedett a szerző a múlt évben?

2. Mit mondott a szerző annak a nőnek, akivel a kórház folyosóján találkozott?

3. A szerző gyermekkorában hogyan (mit) játszottak a lányok?

C) Magio

Sed jam de jardekoj oni nek vidas tiajn ludojn nek aŭdas tradiciajn ludkantojn. La malaperinta aŭ malaperanta mondo de la paradizludo neniam estis paradiza, sed ĝi posedis sian simplan ĉarmon, kiu mankas en la nova malnaiva infanmondo de elektronikaj ludiloj, komputilaj ludoj, komercaĉigita popmuziko kaj poŝtelefonoj: plene forestas la magio de la pasinteco. Ni vivas en mirinda mondo, sed ĝi ne plu estas la mondo de *Alico en Mirlando*.

Nia socio ekonomie riĉiĝis – almenaŭ tie, kie mi nun loĝas – sed ĝi profunde malriĉigis la homan spiriton, forigante la kapablecon trovi plezuron en simplaj, senkostaj amuzaĵoj. Sendube, en ĉiu epoko la maljuniĝantaj generacioj plendas pri riproĉinda „hodiaŭa" socio, sopirante je „bonaj pasintaj tempoj", kiuj neniam estis tiom bonaj – ofte kruelaj kaj mizeraj. Tamen oni ne ĉesis sonĝi pri la oraj tagoj de perdita infaneco. Aŭ ĉu mi estas nur stulta maljuna babilanto?

---

1. Milyen játékokat játszanak mostanában a gyerekek?

2. A szerző miért sajnálkozik gyermekkora elmúlása miatt?

****

Szöveg (3.)

La rolo de lingvoj ĉe la pensado

Antaŭ ses jaroj mi ĉeestis prelegon de profesoro Balabán pri la diferenco inter la pens- kaj esprim-manieroj en la greka kaj hebrea lingvoj. La prelego estis tre interesa. Tamen por ni, kiuj ne regas la hebrean, restis pluraj neklaraĵoj, kiuj instigis al plua serĉado.

Iom da prilumo venis per trastudo de la verko de Balabán: *La hebrea pensmaniero* (1993). Spite tion, tiu problemo sekvis min dum jaroj. Venis al mi la demando, kial, dum tutaj jarcentoj, neniu provis transpontigi tiun abismon? (Poste mi konstatis, ke pluraj tion ja provadis.) Aperis ankaŭ la ideo, ke la kreinto de Esperanto estis laŭ-naske hebreo, studis en „latinaj" lernejoj, tiel ke en lia kapo kunpuŝiĝis ambaŭ tiuj fluoj de pensado kaj esprimado, kaj tio devas speguliĝi en lia ĉefa verko – en Esperanto.

Mi legis la libron de itala filozofo Umberto Eco *La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo*. Fine de siaj pripensoj Umberto Eco venas al la konkludo, ke plej verŝajne oni ne trovos perfektan lingvon, sed al la perfekta lingvo pleje, tiusence, proksimiĝas ĝuste Esperanto, ĉar ĝi enhavas la gravajn elementojn de ambaŭ menciitaj fluoj, el la hebrea precipe la kreivan kunagadon de la uzanto en kreado de esprimoj, kaj la eblon esprimi per unu vorto eĉ tutan ideon, kaj samtempe precize esprimi la nociojn laŭ la greka principo.

Enirante la vojon de proksimiĝado de kristanoj kaj hebreoj, oni komencis serĉi la fontojn kaj la evolu-manierojn de la malharmonio inter la hebreoj kaj kristanoj, kaj kiamaniere tio povis atingi la teruran kulminon – la t.n. holokaŭston. Eĉ se oni ne prezentas tion kiel la ĉefan kaŭzon, tamen ĉiuj agnoskas, ke unu fonto estas ankaŭ la principa diferenco en pensado de hebreoj kaj kristanoj. Eble valorus la penon fake prijuĝi kiomgrade la ŝato kaj admiro pri la greka kaj romia retoriko flanke de Goebbels influis lian sintenon al la judoj. Tio estas du mondoj, esprimiĝis profesoro Balabán en siaj prelego kaj verko.

Eble ĉiuj sentas, ke kun la nova jarmilo ni eniris alian pensmanieron. Vidante la pasintan jarmilon plena de malakordoj, disiĝoj, militoj kaj malamikeco, ni vidas nun ĉie strebadon pri sintezo, proksimiĝado kaj unuigado. Kiel la fendado religia, nacia kaj eĉ atoma estas malbonaj, tiel la sintezo ĉiudirekte estas prospera. Ne nur ajna-forma miksaĵo, sed prudenta komuna strebado pri bono.

La multe pridiskutata, laŭdata, sed ankaŭ malbenata tutmondigo estas ankaŭ certa-forme ia sintezo. Sed la unusola akceptebla formo de tiu tutmondigo estas laŭeble ekvilibra evoluo de la *tuta* globo, en spirito de solidareco. Unueco en plureco kaj diverseco.

Mi volas, ke tiu ĉi atentigo estu plejeble konciza, tial nur kelkaj mencioj: La historiistoj, penetrante profunden en la historion, venis ĝis Sumero. De tie oni supozas la migradon de nia kulturo – tra Asirio kaj Babilonio, Grekio kaj Romia Imperio – ĝis la nuna Eŭropo. Tiu ĉi kulturo uzis, precipe en la epoko de la antikvaj grekoj kaj romianoj, lingvojn, kiuj esprimadis la pensojn dismembrigitaj en vortojn kun precize limigita signifo. Tial nia terminologio baziĝas sur la greka-latina fundamento. Sed el la regiono de Sumero eliris ankaŭ Abrahamo kun sia tribo.

Dum lia vagado ekestis la hebreaj lingvo kaj skribo, kun pluraj specialaĵoj, certe sub influo de la religie perceptata ĉiutaga vivo kaj de la konscio pri la devoj de la elektita popolo.

En la hebrea estis verkita la biblio, la promesoj kaj instruoj de la Eternulo. Profesoro Balabán diras: „La hebrean pensmanieron ne eblas difini, t.e. meti al ĝi ekzaktajn limojn, ĉar ne eblas ĝisvidi la finon aŭ la finan formon.” Kiam aperis la bezono traduki la biblion el la hebrea en la grekan, tiam estiĝis la Septuaginto.

---

1. Milyen gondolkodásmód tükröződik az eszperantóban?
2. Umberto Eco ezzel kapcsolatban milyen következtetésre jutott?
3. Mi a 21. század egyik legjellemzőbb tulajdonsága az országoknak egymáshoz való közeledése terén?
4. Lehet-e a héber nyelvet (nyelvi gondolkodást) más nyelvek alapjának tekinteni? Miért igen? Miért nem?
5. Balaban professzor előadásában mit jelent a két világ?

****

Olvasási készség ellenőrzése kiegészítéssel

A)

Az alábbi szöveget egészítse ki a megadott részekkel. A mondatok legyenek értelmesek! A 0 megoldás szolgál mintául. Két betű fölösleges.

La Loka Kongresa Komitato de la .... (1) Internacia Junulara Kongreso en Zakopane decidis .... (2) malnovan tradicion kaj okazigi belec-konkurson .... (3) "Miss Esperantio". Lastfoje tia konkurso okazis en IJK en Debrecen, Hungario, en 1983.

La Internacian Junularan Kongreson en Zakopane malfermis salutvortoj de la... (4). La plej priparolata programero estis la konkurso pri la plej bela kongresanino – kvankam ĝi ne okazis.

„Pri tio mi persone ege ĝojas! La ideo organizi tiun konkurson dekomence estis fia" – opiniis la rusa kongresinto, Oleg Izjumenko.

Laŭ li, la cetera programo de la IJK estis tre bona, sed la planita konkurso... (5).

„Tiaj konkursoj, pro tio ke ili fondiĝas sur patriarkiaj stereotipoj, malaltigas la rolon de virino kaj degenerigas kaj la .... (6) kaj la spektantojn. Ja eblas konkuri en aliaj kampoj, kiuj estas ne malpli gravaj ol fizika allogeco, kaj ankaŭ viroj povas .... (7) diversajn konkursojn kune kun virinoj, tiel ne substrekante nur unu sekson aŭ gravecon ~~.... (0)~~ (nome de fizika aspekto) de tiu sekso" – opinias Oleg Izjumenko.

Kim Henriksen same ĝojis, ke la konkurso estis .... (8).

„Mi interparolis kun Vera de la LKK, laŭ ŝi oni rezignis pri la konkurso pro tro da protestoj de okcidentuloj... Cetere mi mem dum nia koncerto de Esperanto Desperado .... (9) la konkurso. Kiam ni kantis *Aline,* ni jam en la fino kantas, ke .... (10)."

Írja be a megfelelő betűket a megfelelő helyre!

A) ĉi-jara; B) sub la titolo; C) estis tute neakceptebla; D) partopreni; E) parolis kontraŭ; F) ĉiuj estas belaj; G) renovigi; H) nuligita; I~~) de nur unu trajto~~; J) revivigi; K) parolis en; L) partoprenantojn; M) pola prezidento

~~0~~	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
~~I~~										

B)

Az alábbi szöveget egészítse ki a megadott részekkel. A mondatok legyenek értelmesek! A 0 megoldás szolgál mintául. Két betű fölösleges.

Post la diplomiĝo ~~.... (0)~~ partopreni praktikan laboron, kaj fine ....(1). La prezidento de Hungara Respubliko el ili .... (2) juĝistojn. Ministro pri justicaj aferoj nomumas prokuratorojn kaj notariojn. ... (3) samtempe estas notarioj kaj anoj de ĉambro. .... (4) juristoj-konsilistoj, ... (5) reprezentas entreprenojn, firmaojn.

Juĝistoj apartenas al la Ĉambro de juristoj. Juĝisto estas homo, kiu okupas postenon en tribunalo, kaj faras tie decidojn pri juraj aferoj.

Li decidas ekzemple
- en civilaj procesoj pri kvereloj pri posedaĵaj aŭ financaj .... (6)
- en kriminalaj procesoj pri kondamno de akuzito,
- en administraj procesoj pri ĝusteco de administraj agoj.

.... (7), senpartia persono. En la trovo de la decidoj li estas ligita al leĝoj, la konstitucio, al sia konscienco kaj la homaj .... (8) .

.... (9) estas advokato, kiu konstante kaj jure reprezentas la interesojn de procesanto aŭ akuzato .... (10).

Írja be a megfelelő betűket a megfelelő helyre!

A) ~~*juristo devas,*~~ **B) advokatoj; C) postuloj; D) juĝisto estas neŭtrala; E) prenita juristo; F) en ĵuĝejo; G) havi fakekzamenon; H) rajtoj; I) ekzistas; J) kiuj; K) nomumas; L) el sablo; M) tajpistoj**

0	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
~~A~~										

C)

Az alábbi szöveget egészítse ki a megadott részekkel. A mondatok legyenek értelmesek! A 0 megoldás szolgál mintául. Két betű fölösleges.

~~.... (0)~~ 1999 en multaj landoj oni studas laŭ la instrua sistemo de Bologna. Ĝi havas .... (1). Dum la unua periodo – dum tri studjaroj – la studentoj .... (2) . Post la diplomiĝo ili devas elekti.

Ĉu komenci .... (3) en diversaj institucioj, entreprenoj .... (4) la duan periodon en specialaj fakoj. .... (5) ili ricevas la titolon .... (6). Tio egalas al la universitata diplomo en la nuntempa .... (7) . La tria ŝtupo signifas akiron de la doktora grado (titolo).

.... (8) la studentoj povas interŝanĝi hungarajn kaj eksterlandajn universitatojn, ĉar tiu sistemo .... (9) en 30 landoj. Kompreneble post la diplomiĝo la studentoj povas labori en iu ajn lando. Tio dependas de la fremda lingvoscio de la studentoj, de iliaj vivmaniero, monafera stato kaj .... (10) .

Írja be a megfelelő betűket a megfelelő helyre!

A) ~~ekde;~~ B) „majstro”; C) akiras bazajn fakkonojn; D) post du jaroj; E) dum la studado; F) funkcias; G) aliaj favoraj eblecoj; H) aŭ finstudi; I) sistemo; J) du gradojn; K) la laboron; L) alispecaj; M) akiro

0	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
~~A~~										

D)

Az alábbi szöveget egészítse ki a megadott részekkel. A mondatok legyenek értelmesek! A 0 megoldás szolgál mintául. Két betű fölösleges.

Ni havis nian geedziĝfeston la 11-an de julio 2014. Komence nia geedziĝa ceremonio .... ~~(0)~~, poste ĝi daŭris en la vilaĝdomo.

Ni diris la feliĉigan "jes" dufoje: ĉe la matrikulistino kaj antaŭ la pastro en la preĝejo. Ni kaj niaj 200 gastoj estis feliĉaj kaj gajaj.

.... (1) (buljonon, perkelton, ŝafaĵon, farĉitajn brasikojn, tortojn, sukeraĵojn, bakaĵojn). Ni trinkis bieron, vinon, refreŝigaĵojn, mineralakvon kaj alkoholaĵojn.

.... (2) nian kelketaĝan vanilan torton. Ĉiuj gastoj povis manĝi el ĝi.

Noktomeze – laŭ hungaraj popolaj kutimoj – la nuptaj gastoj povis danci kun mi (kun la nova edzino) paginte pli-malpli grandan monsumon, ... (3).

Krome ni ricevis diversajn donacojn, ... (4). La invititoj donacis lavmaŝinon, teler-lavmaŝinon, televidilon, meblaron, tapiŝojn, servicon, manĝilaron, poŝtelefonon, fridujon, gasfajrujon ktp.

Vi povas demandi min: kiel mi opinias pri la geedziĝa vivo, labordivido, infanoj.

Laŭ mia opinio oni devas fondi familion nur .... (5). Se oni ne faras tion, povas naskiĝi tiuj infanoj, kiujn oni ne amas, ne estimas, ne vartas sufiĉe, kaj ili kreskas en malŝatata etoso. Se edzo kaj edzino devas disigi, tio kaŭzas grandan problemon en la vivo de infanoj. Estas tiuj infanoj, kiuj devas plenkreski, ... (6).

Ofte infanoj restas sen gepatroj, ... (7). Bedaŭrinde en nia lando naskiĝas pli kaj pli malmulte da infanoj, ĉar nia ŝtato ne donas sufiĉe altan socian, materialan apogon al la gepatroj. Kiu havas malaltan vivnivelon, tiu havas pli malmulte da infanoj. .... (8) ne komprenas unu la alian, ili disputas multe, eĉ kelkfoje ili batalas, batas unu la alian. Vi povas imagi, ke en tiu malagrabla etoso .... (9) vivkapablaj. Multaj provas interkonatiĝi en specialaj kluboj por elekti unu la alian por geedziĝo.

Mi ne pensas, ke ekzistas tiel nomataj idealaj taskoj (roloj) por edzo aŭ edzino, tamen kaj edzo kaj edzino devas toleri multe dum siaj komunaj jaroj.

Mi esperas, ke ni estos ĉiam feliĉaj .... (10).

Írja be a megfelelő betűket a megfelelő helyre!

-

~~*A) okazis en la preĝejo de nia vilaĝo;*~~ **B) ĉar ni komprenas unu la alian; C) estas granda problemo, ke la geedzoj; D) post serioza decido kaj longa pripensado; E) tagmeze ni manĝis diversajn bongustajn manĝaĵojn; F) noktomeze ni distranĉis; G) por ke ni havu "kapitalon" por nia estonto; H) ĉefe hungarajn forintojn en kovertoj; I) por ke ni ne havu "kapitalon"; J) edukiĝi en diversaj hejmoj de nia ŝtato; K) ili estas orfoj; L) infanoj ne povas esti sanaj; M) ni ne komprenas**

~~0~~	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
~~A~~										

FELHASZNÁLT IRODALOM ÉS FORRÁSOK

Dr. Szerdahelyi István: Kevés szóval eszperantóul. Tankönyvkiadó, Bp. 1987.

Eszperantó szöveggyűjtemény a Kossuth Lajos Tudományegyetem Bölcsészettudományi Karának hallgatói részére. Szerkesztette: dr. Salga Attila. Debrecen 1989.

Pricz Oszkár: Eszperantó nyelvkönyv. Magyar Eszperantó Szövetség, Bp. 1990.

Eszperantó írásbeli nyelvvizsga. Szerkesztő: Salomonné Csiszár Pálma. Akadémiai Kiadó, Bp. 2010.

Princz Oszkár -- Vizi László: Felkészülés az eszperantó nyelvvizsgára. Magyarországi Eszperantó Szövetség, Bp. 2003.

Dr. Salga Attila: Eszperantó nyelv kezdő szinttől az államilag elismert nyelvvizsgáig. Debrecen 2012.

Dr. Salga Attila Eszperantó társalgó az államilag elismert nyelvvizsga témaköreiből. Debrecen 2014.

Dr. Salga Attila: Eszperantó írásbeli vizsga alap-, közép- és felsőfokon. Debrecen 2012.

Idegennyelvi Továbbképző Központ honlapja.
www.itk.hu

Origó Nyelvi Centrum honlapja.
www.onyc.hu

TARTALOMJEGYZÉK (ENHAVO)

Általános tudnivalók.....3
Vizsgakövetelmények.....4
Írásbeli erősítő (1. rész).....7
Írásbeli erősítö (2. rész).....9
Írásbeli erősítő (3. rész).....12
Írásbeli erősítő (4. rész).....15
Írásbeli erősítő (5. rész).....18
Írásbeli erősítő (6. rész).....21
Írásbeli erősítő (7. rész).....24
A tárgyeset használatáról.....27
A magyar -ra, -re, -n, -on, -en, -ön ragok fordítása.....31
A magyar -ra, -re, -n, -on, -en, -ön ragok fordítása (feladatlap).....33
Az eszperantisták 12 pontja.....36

ALAPFOK

Komplett feladatsor.....38
Szövegértés
Szövegértés (1.).....44
Szövegértés (2.).....45
Levélírás
Levél (1.).....46
Levél (2.).....47
Levél (3.).....48
Levél (4.) 48
Levél (5.).....49
Levelezési témák (feladatok).....50
Vélemény, információ közlése 55
Közvetítői készség vizsgálata
Közvetítői készség (1.).....55
Közvetítői készség (2.).....56
Közvetítői készség (3.).....57
Közvetítői készség (4.).....58
Közvetítői készség (5.).....59
Közvetítői készség (6.).....60

KÖZÉPFOK

Komplett feladatsor.....62
Fordítás eszperantóról magyarra
Rövid szövegek kulccsal.....68
Teljes szövegek
1. La “prienergetikaj Oscar-premioj”.....74
2. Ekspozico trovis novajn speciojn da flaŭro kaj floro en Nov-Gvineo.....74
3. Adriatika maro.....75
4. La rolo de la germana lingvo en la internacia komunikado.....76
5. La svisa modelo.....76
6. Lingva identeco.....77
7. Enmigrado anta kaj inta.....77
8. Kio estas la Universala Esperanto-Asocio (UEA)?.....78

Irányított fogalmazás (Levélírás)
Bevezetés..... 78
Befejezés..... 78
Levél (1.)..... 79
Levél (2.)..... 80
Levél (3.)..... 81
Levél (4.)..... 82
Levél (5.)..... 83
Levél (6.)..... 83
Levél (7.)..... 84
Levél (8.)..... 85
Levélírási témák..... 85
Vélemény, információ¸írása
1-14 89
Szövegértést ellenőrző feladatok
1. La fino de Vincent van Gogh..... 91
2. Kalocsay kaj Baghy en Ĉinio..... 92
3. Mia profesio estas stenografo..... 94
4. Parolas Pekino..... 96
5. Pri la revuo "Kontakto"..... 97
6. Pri John Baŭer..... 98
7. La boatisto..... 99
8. Pri Lajos Kossuth.....100
9. Senhejmuloj.....101
Olvasási készség ellenőrzése
A) -- G) 102

FELSŐFOK

Komplett feladatsor..... 110
Magyar szöveg tömörítése eszperantóul
1. Édes élet 118
2. Új liturgikus nyelvek..... ..119
3. Mire jó az eszperantó?..... ..120
4. Ki miért tanul eszperantóul?..... ..120
5. Lesz-e semleges közös nyelvünk?..... ..121
Fordítás eszperantóról magyarra
1. Kiel rekrei la bildon pri Esperanto?..... ..123
2. Memoro pri oi bela..... ..124
3. Sur propra tereno estas propra preĝejo..... ..125
4. Biografio de Zamenhof..... ..125
5. Resumo.....126
Irányított fogalmazás, levélírás
Levél (1.).....129
Levél (2.).....130
Levél (3.).....131
Levél (4.).....132
Levél (5.).....132
Levél (6.).....133
Levél (7.).....134
Levélírási témák.....135
Vélemény, információ közlése..... 137
Szövegértést ellenőrző feladatok kérdésekkel
Szövegek (1-3.) 140
Olvasási készség ellenőrzése kiegészítéssel
A) -- D) 145